


eLIBRO

Rudolf Erich Raspe

La vojaĝoj
kaj mirindaj
aventuroj de
barono
Münchhausen

I N K O



Rudolf Erich Raspe

**LA VOJAĜOJ KAJ MIRINDAJ AVENTUROJ
DE BARONO MÜNCHHAUSEN**

El la angla tradukis J. D. Applebaum

Lingve reviziita en 2002

Ilustrita de Gustave Doré

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-141-0

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

JANUARO 2002

PARTO I

Ĉapitro I

**La barono rakontas siajn aventurojn
al amikoj ĉe botelo**

La barono rakontas pri siaj unuaj vojaĝoj. La miregigaj efikoj de uragano. — Li alvenas Cejlonon, venkas du eksterordinarajn kontraŭulojn, revenas al Holando.

Kelke da jaroj antaŭ ol mia barbo anoncis baldaŭan plenaĝon, aŭ, alivorte, kiam mi estis nek viro nek knabo, sed inter ambaŭ, mi esprimis en diversaj konversacioj fortan deziron vidi la mondon; pri tio malkuraĝigis min miaj gepatroj, kvankam mia patro mem multe vojaĝis, kio evidentiĝos, antaŭ ol mi finos mian strangan kaj, mi povas aldoni, interesan rakonton. Kuzo de mia patrino flanko tre amis min kaj ofte diris, ke mi estas brava, vigla junulo, kaj multe inklinita kontentigi mian scivolemon. Lia elokventeco havis pli fortan efikon ol mia, ĉar mia patro konsentis, ke mi akompanu lin en vojaĝo al la insulo Cejlono, kie lia onklo loĝis multajn jarojn kiel guberniestro.

Ni ŝipveturis for el Amsterdamo kun dokumentoj de iliaj altaj ekscelencoj la ŝtatestroj de Holando. La sola rakontinda okazintaĵo dum la vojaĝo estis la mirindaj efikoj de uragano, kiu eltiris kun la radikoj multnombrajn arbojn de eksterordi-


naraj dikeco kaj alteco. Tio okazis sur insulo, kie ni ankris por preni lignon kaj akvon; kelkaj el tiuj arboj pezis multajn tunojn, tamen la ventego portis ilin tiel mirinde alten, ke ili aspektis kiel plumetoj de malgrandaj birdoj flugantaj en la aero,





ĉar ili estis minimume kvin mejlojn super la tero. Sed kiam la uragano trankviliĝis, ili ĉiuj tuj falis vertikale sur siajn respektivajn lokojn kaj enradikiĝis denove, escepte de la plej granda, kiu, kiam ĝi forbloviĝis en la aeron, havis sur siaj branĉoj viron kaj lian edzinon, tre honestan maljunan paron, kiu kolektis kukumojn. (En tiu parto de la terglobo ĉi tiu utila vegetaĵo kreskas sur arboj.) Dum la falo de la arbo la pezo de ĉi tiu paro klinis la trunkon kaj faligis ĝin en horizontala pozicio: ĝi falis sur la ĉefon de la insulo kaj tuj mortigis lin; li estis forlasinta la domon dum la uragano, timante, ke ĝi falos sur lin, kaj estis revenanta tra sia propra ĝardeno, kiam ĉi tiu feliĉa






akcidento okazis. La vorto feliĉa ĉi tie postulas iom da klarigo. Tiu ĉefo estis homo kun tre avara kaj despota karaktero, kaj kvankam li ne havis familion, la indiĝenoj de la insulo preskaŭ mortis pro malsato sekve de liaj subpremantaj kaj malnoblaj impostoj. La objektoj, kiujn li tiamaniere prenis de ili, eĉ estis putrantaj en liaj provizejoj, dum la kompatindaj mizeruloj, de kiuj li forrabis ilin, konsumiĝis en malriĉeco. Kvankam la pereigo de ĉi tiu tirano estis akcidento, la popolo elektis la kukum-kolektantojn por la ofico de ĉefoj; jen signo de dankemo pro la mortigo, kvankam akcidenta, al ilia tirano.

Riparinte la difektojn, suferitajn en tiu eksterordinara uragano, kaj adiaŭinte la novan ĉefon kaj lian edzino-moŝton, ni eknavigis kun bona vento al la celo de nia vojaĝo.

Post proksimume ses semajnoj ni alvenis en Cejlono, kie oni akceptis nin kun grandaj signoj de amikeco kaj vera ĝentileco. La sekvantaj strangaj aventuroj eble ne estos tedaj.

Loĝinte en Cejlono proksimume dek kvar tagojn, mi akompanis al ĉaso unu el la fratoj de la guberniestro. Li estis forta, atleta homo, kaj, al kutimiĝinte al tiu klimato (ĉar li jam



loĝis tie kelkajn jarojn), li eltenis la varmegon de la suno pli bone ol mi; dum nia ekskurso li estis multe progresinta tra densa arbaro, dum mi estis nur ĉe la eniro.

Apud la bordoj de vasta parto da akvo, kiu okupis mian atenton, mi pensis, ke mi aŭdas susurantan bruon malantaŭ mi; turninte min, mi preskaŭ ŝtoniĝis ĉe la ekvido de leono, kiu evidente alproksimiĝis kun la intenco kontentigi sian apetiton per mia kompatinda korpo, eĉ ne petante mian konsenton.

Kion fari en tiu terura dilemo? Mi ne havis eĉ unu momenton por pripensi. Mia pafilo estis ŝargita nur per kugletoj, kaj kuglojn mi ne havis. Kvankam mi ne povis imagi la eblecon mortigi tian beston per tia malforta municio, tamen mi havis esperon timigi ĝin per la bruo kaj eble ankaŭ vundi ĝin. Mi tuj ekpafis, ne atendante ĝian alproksimiĝon, kaj la bruo nur kolerigis ĝin; ĝi plirapidigis siajn paŝojn kaj ŝajne proksimiĝis al mi plej rapide. Mi provis forkuri, sed tio nur pliigis (se tio estus ebla) mian maltrankvilecon; ĉar en la momento, kiam mi turnis min, mi ekvidis grandan krokodilon kun malfermita

buŝego preskaŭ preta min akcepti. Dekstre de mi estis la akvo menciita antaŭe kaj maldekstre profunda krutegaĵo, havanta, kiel mi poste eksciis, ujon ĉe la fundo kun venenaj krei-



taĵoj; unuvorte, mi rigardis min perdita, ĉar la leono nun staris sur siaj malantaŭaj piedoj kaj ĝuste estis ekkaptonta min. Pro timo mi falis senvole sur la teron, kaj, kiel poste evidentiĝis, la leono transsaltis super min. Mi kuŝis kelkan tempon en situacio ne priskribebla per vortoj, atendante ĉiumomente senti ĝiajn dentojn aŭ ungegojn en iu parto de mi. Restinte en tiu malfeliĉa situacio kelkajn sekundojn, mi aŭdis furiozan, sed neordinaran bruon, malsimilan al kiu ajn sono, kiu iam antaŭe trafis miajn orelojn; kaj oni ne miros pri tio, se mi informos vin, de kie ĝi venis: post kelktempa aŭskulto mi kuraĝis levi mian kapon kaj ĉirkaŭrigardi, kaj tiam, je mia ne priskribebla ĝojo, mi vidis, ke la leono, avide saltante al mi, saltis antaŭen, dum mi falis, en la buŝegon de la krokodilo, kiu, kiel mi jam diris, estis larĝe malfermita. La kapo de unu fiksiĝis en la gorĝo de la alia! Kaj ili baraktis, por sin liberiĝi! Mi feliĉe ekmemoris mian ĉas-tranĉilon, kiu pendis ĉe mia flanko; per ĝi mi detranĉis la kapon de la leono per unu frapo, kaj la korpo falis al miaj piedoj! Poste per la kolbo de mia pafilo mi enbategis la kapon de la leono pli profunden en la gorĝon de la krokodilo kaj pereigis ĉi tiun per sufokigo, ĉar ĝi ne povis engluti nek eligi la leonan kapon.

Tuj post kiam mi tiel komplete venkis miajn du potencajn kontraŭulojn, mia kunulo alvenis, serĉante min; ĉar rimarkinte, ke mi ne sekvis lin en la arbaron, li revenis, pensante, ke mi perdis la vojon, aŭ ke iu akcidento trafis min.

Post reciproka gratulado mi mezuris la krokodilon, kiu havis la longecon de kvardek futoj.

Tuj kiam mi estis rakontinta al la guberniestro ĉi tiun eksterordinaran aventuron, li sendis veturilon kaj servistojn, kiuj portis hejmen la du kadavrojn. La felon de la leono oni



bone preparis, kune kun la haroj, kaj oni faris el ĝi tabakujojn, kiujn post nia reveno al Holando mi donacis al la urbestroj, kiuj rekompence petis, ke mi akceptu mil dukatojn. La haŭton de la krokodilo oni pajloŝtopis en la kutima maniero, kaj ĝi estas bonega objekto en la publika muzeo de Amsterdam, kie la gvidisto rakontas al ĉiu vizitanto la tutan aventuron,

kun tiuj aldonoj, kiujn li trovas konvenaj. Kelkaj el liaj variaĵoj estas iom fantaziaj. Unu el ili estas, ke la leono rekte saltis tra la krokodilo, kaj eliris tra la malantaŭa pordo, kaj en la momento, kiam ĝia kapo aperis, lia sinjora moŝto la granda barono, (kiel plaĉas al li nomi min) detranĉis ĝin, kune kun tri futoj de la krokodila vosto. Ĉi tiu homo havas tiel malmulte da respekto al la vero, ke li iufoje aldonas, ke tuj kiam la krokodilo eksentis la perdon de sia vosto, ĝi turnis sin, ekprenis la ĉastranĉilon el la mano de la sinjoro, kaj englutis ĝin kun tia avideco, ke la tranĉilo trapikis ĝian koron kaj tuj mortigis ĝin.


La malgranda respekto, kiun tiu aroganta fripono havas al la vero, iufoje igas min timi, ke miaj veraj rakontoj estos suspektindaj, kiam oni trovos ilin kune kun liaj abomenaj elpensajoj.

Ĉapitro II

En kiu la barono montras sin bonega pafisto. — Li perdas sian ĉevalon kaj trovas lupon — devigas ĝin tiri sian glitveturilon — promesas regali siajn amikojn per rakonto de tiaj faktoj, kiuj bone meritos ilian atenton.

Mi ekvojiris el Romo, por vojaĝi al Ruslando meze de vintro, ĝuste pensante, ke frosto kaj neĝo nature plibonigos la vojojn, kiuj, laŭ la diro de ĉiu vojaĝanto, estas eksterordinare malbonaj en la nordaj partoj de Germanujo, Polujo, Kurlando kaj Litovujo. Mi iris surĉevale, ĉar tio estas la plej





oportuna maniero vojaĝi; mi estis malpeze vestita, kaj pro tio mi des pli sentis la maloportunecon, ju pli nordorienten mi antaŭvenis. Kiom devis suferi en tiuj severaj vetero kaj klimato tiu kompatinda maljunulo, kiun mi trovis sur senŝirma kampo en Polujo! Li kuŝis sur la vojo, senhelpa, tremanta kaj havanta preskaŭ neniun kovraĵon por sia nudeco. Mi kompatas la malfeliĉan homon; kvankam mi mem sentis la akrecon de la aero, mi tamen ĵetis sur lin mian mantelon, kaj tuj mi aŭdis voĉon el la ĉielo, benanta min pro tiu bonfara ago, kaj diranta: "Mia filo, por ĉi tio vi iam ricevos rekompencan." Mi iris antaŭen; nokto kaj mallumo ĉirkaŭis min. Neniu vilaĝo estis videbla. La tuta kamparo estis kovrita de neĝo, kaj mi ne konis la vojon.

Lacigita mi elseliĝis kaj alligis mian ĉevalon al io simila al pinta stumpo de arbo, elstaranta el neĝo. Por defendo mi metis miajn pistolojn sub mian brakon kaj kuŝigis min sur la neĝo, kie mi dormis tiel bone, ke mi ne malfermis miajn okulojn ĝis plena taglumo. Ne estas facile kompreni mian mire-


gon, kiam mi trovis min kuŝanta en tombejo meze de vilaĝo; kaj mia ĉevalo ne estis videbla, sed tuj poste mi aŭdis ĝin blekanta ie super mi. Rigardante supren, mi ekvidis ĝin pendanta per la brido ĉe la ventoflago de la turo. La afero nun kla-



riĝis al mi: en la vespero la vilaĝo estis kovrita de neĝo; subita ŝanĝo de vetero okazis; mi malsupreniĝis al la tombejo dum la dormo, malrapide kaj nesentible, dum la neĝo degelis; kaj tio, kion mi konsideris en la mallumo kiel stumpon de malgranda arbo, kiu elstaris super la neĝo kaj al kiu mi alligis mian ĉevalon, efektive estis la kruco aŭ la ventoflago de la preĝeja turo!

Post mallonga pripenso mi prenis unu el miaj pistoloj, dispafis la bridon, malsuprenigis la ĉevalon kaj daŭrigis mian vojaĝon.

Ĝi irigis min bone antaŭen en la internan parton de Ruslando. Mi trovis surĉevalan vojaĝon en vintro ne laŭmoda, tial mi submetis min, kiel mi ĉiam faras, al la kutimo de la lando, prenis unuĉevalan glitveturilon kaj veturis vigle al Peterburgo. Mi ne ĝuste memoras, ĉu estis en Estlando aŭ en Ingermanlando, sed mi memoras, ke meze de sovaĝa arbaro mi ekvidis teruran lupon kuranta post mi kun la tuta rapideco



de avida vintra malsatego. Ĝi baldaŭ atingis min. Estis neniu ebleco de saviĝo.

Meĥanike mi kuŝigis min plate en la veturilo kaj lasis mian ĉevalon kuri laŭplaĉe por sinsavo. Tio, kion mi deziris, sed apenaŭ esperis aŭ atendis, okazis tuj poste. La lupu tute ne atentis min, sed faris saltegon super min kaj, furioze atakante la ĉevalon, komencis rapide disŝiri kaj manĝegi la malantaŭan parton de la kompatinda besto, kiu kuris tiom pli rapidege pro doloro kaj teruro. Do mem ne rimarkita kaj tute ekster danĝero, mi singarde levis mian kapon kaj kun naŭzego vidis, ke la lupu, manĝante, penetris en la korpon de la ĉevalo; post ne longe ĝi tute enigis sin en la ĉevalon. Tiam mi profitis la okazon kaj batis ĝin per la tenilo de mia vipo. Ĉi tiu neatendita atako sur ĝia malantaŭa parto tiel timigis la lupon, ke ĝi saltis antaŭen per sia tuta forto. La kadavro de la ĉevalo falis sur la teron, sed anstataŭ ĝi la lupu estis en la jungaĵo, kaj mi vipis ĝin konstante. Ni ambaŭ alvenis en plena kurado tute bone en Peterburgon, tute kontraŭe al nia atendado, kaj tre admiregataj de la rigardantoj.

Mi ne volas enuigi vin, sinjoroj, per la politiko, arto, scienco, kaj historio de tiu belega ĉefurbo de Ruslando, nek ĝeni vin per la diversaj intrigoj kaj agrablaj aventuroj, kiujn mi spertis en la ĝentilaj rondoj de tiu lando, kie la mastrino de domo ĉiam akceptas la vizitanton kun trinkaĵo kaj saluto. Mi prefere parolos pri la pli grandaj kaj pli noblaj objektoj de via atento, ĉevaloj kaj hundoj, miaj plej amataj el la bestaj kreiĵoj; ankaŭ pri vulpoj, lupoj kaj ursoj, de kiuj, same kiel de alia ĉasaĵo, en Ruslando ĝenerale estas pli granda abundo ol en ĉiu alia lando de la mondo; fine pri tiaj sportoj, viraj ekzercoj kaj agoj de galanteco kaj aktiveco, kiuj distingas la sinjo-

rojn pli bone ol la ŝima greka aŭ latina lingvo aŭ ĉiuj parfumoj, delikataĵoj kaj petolaĵoj de la francaj sprituloj aŭ "petit-mâtres".

Ĉapitro III

Renkonto inter la nazo de la barono kaj porda fosto. — Ĝiaj mirindaj efikoj. Li trafas kvindek parojn da anasoj per unu pafo — elvipas vulpon el ĝia felo — kondukas hejmen maljunan porkinon en nova maniero — kaj venkas sovaĝan apron.

Pasis iom da tempo, antaŭ ol mi povis ricevi oficiran komision en la armeo, kaj en la daŭro de kelkaj monatoj mi estis tute libera por disperdi mian tempon kaj mian monon en la plej grandsinjora maniero. Vi bone povas imagi, ke mi foruzis multon de ambaŭ ekster la urbo kun tiuj bravaj homoj, kiuj sciis, kiel plej bone profiti tian arbaroriĉan landon. Eĉ la memoro pri tiuj amuzaĵoj donas al mi freŝan spiriton kaj kreas varman deziron al ilia ripetado.

Iun matenon mi vidis tra la fenestroj de mia dormoĉambro, ke granda lago, ne malproksime de tie, estis kovrita de sovaĝaj anasoj. Tuj mi prenis mian pafilon el la angulo, kuris malsupren kaj el la domo kun tia rapideco, ke mi akcidente vundis mian vizaĝon ĉe la porda fosto. Fajro elflugis el miaj okuloj, sed tio ne malhelpis mian intencon; mi baldaŭ venis sufiĉe proksime por pafi. Tiam, direktante mian pafilon, mi vidis kun ĉagreno, ke la siliko elsaltis el la ĉano per la forteco de la frapo, kiun mi ricevis antaŭ nelonge. Mi devis ne perdi tempon. Mi tuj memoris la efikon de la frapo al miaj oku-

loj, tial mi malfermis la pfanon, direktis la pafilon al la birdoj kaj mian pugnon al mia okulo. Forta frapo de mia pugno de-nove eligis fajrerojn el mia okulo; la pulvo eksplodis, kaj mi mortigis kvin parojn da anasoj, dudek marekojn kaj tri parojn da kerkedolaj. Spiritĉeesto estas la esenco de vira ekzerci-



ĝado. Dum soldatoj kaj maristoj ŝuldas al tio multajn el siaj feliĉaj saviĝoj, ĉasistoj kaj sportistoj ne pli malmulte ŝuldas al tio siajn sukcesojn.

En iu nobela arbaro en Rusujo mi renkontis belan nigran vulpon; estus domaĝe ties multvaloran felon difekti per kuglo aŭ pafaĵo. La vulpo staris proksime de arbo. Rapide mi elprenis la kuglon kaj metis bonan najlon en ĝian lokon, pafis kaj trafis tiel bone, ke mi alnajlis ĝian voston al la arbo. Mi tuj aliris, eltiris mian tranĉilon, faris kruc-tranĉon trans ĝian vizaĝon, ekprenis mian vipon kaj elvapis la vulpon el ĝia bela felo.

Okazo kaj bonŝanco ofte korektas niajn erarojn; por tio mi havis strangan ekzemplon tuj poste, kiam en la profundo de iu arbaro mi vidis sovaĝajn porkon kaj porkinon, kurantajn proksime unu post la alia. Mia kuglo maltrafis ilin, tamen nur la antaŭa porko forkuris, sed la porkino ekstaris senmove, kvazaŭ fiksita al la tero. Ekzamenante la aferon, mi trovis, ke la besto estas tre maljuna porkino, blinda pro maljuneco. Ĝi kutimis buŝteni la voston de sia ido, por esti kondukata laŭ fila devo. Mia kuglo trafis la voston kaj distranĉis ĝin, sed la maljunulino daŭre tenis la restintan parton en sia buŝo, kaj



ĉar ĝia antaŭa gvidanto ne plu tiris ĝin, ĝi kompreneble haltis. Tial mi prenis la restintan parton de la porka vosto kaj kondukis la maljunan beston hejmen sen plia peno miaflanke kaj sen kontraŭvolo aŭ timo flanke de la senhelpa maljuna porkino.

Teruraj estas tiuj sovaĝaj porkinoj, kaj tamen ankoraŭ pli furiozaj kaj danĝeraj estas la aproj. Unu el ili mi foje renkontis en arbaro, malfeliĉe ne estante preparita por atako aŭ defendo. Mi retiris min post kverkon ĝuste en la momento, kiam la furioza besto celis flankan atakon al mi kun tia forteco, ke ĝiaj dentegoj traboris la arbon; sekve de tio ĝi nek povis ripeti la atakon, nek retiri sin ...”Ho, ho!”, mi pensis, ”baldaŭ mi vin havos!” kaj tuj mi prenis ŝtonon, per kiu mi martelis kaj kurbigis ĝiajn dentegojn tiamaniere, ke ĝi ne povis foriri; ĝi nepre devis atendi mian revenon el la proksima vilaĝo. Mi iris tien por preni ŝnuregon kaj veturilon por bone ligi kaj poste forporti ĝin sendifekta kaj vivanta, en kio mi perfekte sukcesis.

Ĉapitro IV

Meditadoj pri la cervo de Sankta Huberto. — Li pafas cervon per ĉerizokerno; la mirindaj efikoj de ti u pafo. Li mortigas urson per eksterordinara lerteco, priskribas kortuŝe la danĝeron. Lin atakas lupu, li turnas ĝian internon eksteren. — Atakas lin rabia hundo, de kiu li sin savas. — Lia surtuto fariĝas rabia, kaj lia tuta vestaro estas ĵetita en konfuzan staton.

Vi aŭdis sendube pri Sankta Huberto, la sanktulo kaj protektanto de ĉasistoj kaj sportistoj, kaj pri la nobla cervo, kiu aperis al li en arbaro, kun sankta kruco inter siaj kornoj. Mi alportis mian respekteton al tiu sanktulo ĉiujare en bona societo kaj vidis tiun cervon milfoje, aŭ pentrita en preĝejo, aŭ brodita inter la steloj de liaj kavaliroj, tial, je honoro kaj konscienco de bona sportisto, mi apenaŭ scias, ĉu efektive antaŭe ekzistis aŭ eĉ nuntempe ekzistas tiaj kruchavantaj cervoj. Sed permesu al mi prefere rakonti, kion mi mem vidis. Eluzinte iun tagon mian tutan pafaĵon, mi trovis min neatendite en ĉeesto de majesta cervo; ĝi rigardis min tiel sentime, kvazaŭ ĝi scius pri mia malplena kuglujo. Mi tuj ŝargis mian pafilon per pulvo kaj metis sur ĝin plenmanon da ĉerizokerno, de kiuj mi forigis la fruktokarnon tiom, kiom la rapideco tion permesis. Tiel mi pafis kaj trafis ĝin ĝuste en la mezo

de ĝia frunto, inter la kornoj; tio senkonsciigis ĝin, ĝi ŝanceliĝis, sed forkuris. Unu aŭ du jarojn poste, estante kun ĉasistaro en la sama arbaro, mi ekvidis belan cervon kun bela plenkreska ĉerizarbo, pli ol dek futojn alta, inter ĝiaj kornoj. Mi tuj rememoris mian antaŭan aventuron, rigardis ĝin kiel mian proprajon kaj faligis ĝin per unu pafo, kiu samtempe



donis al mi la kokson kaj la ĉerizan saŭcon; ĉar la arbo estis riĉe kovrita de plej delikataj fruktoj, kiajn mi neniam antaŭe gustumis. Kiu scias, ĉu eble iu fervora sankta sportisto aŭ sportema abato aŭ episkopo similmaniere pafis, plantis kaj fiksis la krucon inter la kornoj de la cervo de Sankta Huberto? Ili ĉiam estis kaj ankoraŭ estas famaj pro plantado de krucoj kaj — kornoj¹; kaj okaze de akcidento aŭ dilemo, kiujn ofte renkontas fervoraj sportistoj, oni kaptas kion ajn por sin-savo kaj prefere provas ĉiun rimedon anstataŭ maltrafi favoran okazon. Mi ofte trovis min en tia situacio.

Kion vi diros ekzemple pri jena afero? Iun tagon en pola arbaro taglumo kaj pulvo estis eluzitaj. Dum mi reiris hejmen, terura urso tre rapide persekutis min kun malfermita buŝo, preta ataki min; mi tuj traserĉis ĉiujn miajn poŝojn pro pulvo kaj kugloj, sed vane; mi trovis nenion krom du ekstraj silikoj. Unu el ĉi tiuj mi ĵetis per mia tuta forto tra la malfermita buŝego de la monstro en ĝian gorĝon. Tio kaŭzis al ĝi doloron kaj igis ĝin turni sin tiel, ke mi povis ĵeti la duan silikon en ĝian malantaŭan pordon, kion mi efektive faris kun granda sukceso; ĉar ĝi enflugis internen, kunpuŝiĝis kun la unua siliko en la stomako, tiel ke estiĝis fajro, kaj sekve de tio la urso dispartiĝis per terura eksplodo. Kvankam mi mem forŝaviĝis el danĝero tiun fojon, mi ne dezirus, denove provi similan eksperimenton aŭ sen alia municio iri kontraŭ urso.

Estis, por tiel diri, mia fatalo, ke la plej furiozaj kaj plej danĝeraj bestoj ĝenerale renkontis min tiam, kiam mi estis sendefenda, kvazaŭ ili sciis aŭ havus instinktan informon pri tio. Ekzemple, terura lupu kuregis al mi foje tiel subite kaj tiel proksime, ke mi ne povis fari ion alian ol sekvi meĥanikan

1 Simbola esprimo, signifanta: fari mokaĵojn aŭ petolaĵojn.





instinkton kaj ŝovegi mian pugnon en ĝian malfermitan buŝon. Pro mia sekureco mi puŝadis plu kaj plu, ĝis kiam mia brako eniris interne ĝis la ŝultro. Kiel liberigi min? Mi ne es-



tis tute kontenta en mia malfacila situacio. — Jen lupo vizaĝon kontraŭ vizaĝo; nia reciproka okulumado ne estis el la plej agrabla speco. Se mi eltirus mian brakon, la besto sin ĵetus des pli furioze sur min; tion mi vidis en ĝiaj flamantaj okuloj. Mallonge dirite: mi prenis ĝian voston, turnis ĝian internon eksteren, kiel oni faras tion je ganto, kaj ĵetis ĝin sur la teron, kie mi lasis ĝin.

La sama rimedo ne estus servinta ĉe rabia hundo, kiu baldaŭ poste kuris al mi sur mallarĝa strato en Peterburgo. Oni devas forkuri, mi diris al mi; kaj por fari tion pli bone, mi deĵetis mian peltan mantelon kaj tre baldaŭ trovis min sendanĝera en mia domo. Poste mi sendis mian serviston pro la mantelo, kaj li metis ĝin en la ŝrankon kun miaj aliaj vestoj. En la sekvanta tago mi estis miregigata kaj timigata per la kriado de Joĉjo: "Pro Dio, sinjoro, via pelta mantelo estas rabia!" Mi alrapidis kaj trovis preskaŭ ĉiujn miajn vestojn ĉirkaŭenĵetitaj kaj disŝiritaj en pecojn. La viro estis tute pra-




va en sia konstato pri la rabieco de la mantelo. Mi mem vidis ĝin ĝuste en tiu momento atakanta belan frakon, kiun ĝi skuadis kaj ĉirkaŭenĵetis en senkompata maniero.

Ĉapitro V


La efikoj de granda aktiveco kaj spiritĉeesto. — Li priskribas favoratan hundon, kiu naskis dum ĉasado, postkurante leporon: la leporo ankaŭ naskis dum forkuro. — Li donace ricevas de grafo Przoboski faman ĉevalon, kun kiu li faras multajn eksterordinarajn agojn.


Ĉiuj ĉi tiuj feliĉaj forsaviĝoj, sinjoroj, estis ŝancoj, uzitaj avantaĝe per spiritĉeesto kaj fortaj penegoj, kiuj, prenate kune, kiel ĉiu scias, faras la sukcesplenan sportiston, mariston aŭ soldaton; sed tre riproĉinda kaj senprudenta estus tiu sportisto, admiralo aŭ generalo, kiu ĉiam dependus de siaj feliĉaj sorto kaj steloj, ne zorgante pri tiuj specialaj artifikoj necesaj por lia profesio, kaj ne provizante sin per la plej bonaj iloj, kiuj certigas sukceson. Oni povas kulpigi min nek pri unu nek pri la alia flanko; ĉar mi ĉiam estis fama kaj pro la bonegeco de miaj ĉevaloj, hundoj, pafiloj kaj glavoj, kaj pro la lerta maniero de ilia uzado kaj manovrado, do parolante ĝenerale: mi povas esperi, ke oni memoros min en arbaro, sur kampo kaj en ĉevalkurejo. Mi ne volas rakonti ĉi tie la detalojn de miaj ĉevalstaloj, hundejoj aŭ batalilejo; sed mi nepre devas mencii unu tre amatan hundinon. Ĝi estis ĉashundino, kaj mi neniam havis nek vidis pli bonan. Ĝi maljuniĝis en mia servo kaj estis notinda ne pro sia grandeco, sed prefere pro



sia neordinara rapideco. Mi ĉiam ĉasis leporojn kun ĝi. Se vi estus vidintaj ĝin, vi certe ĝin admirus kaj ne mirus, ke mi tiel amis ĝin kaj ke mi ĉasis kun ĝi tiel multe. Ĝi kuris tiel rapide, tiel multe kaj tiel longe en mia servo, ke en la lastaj tagoj de ĝia vivo mi estis devigata uzi ĝin sole kiel terhundon, en kiu ofico ĝi ankoraŭ servis al mi dum multaj jaroj.

Ĉasante iutage leporon, kiu ŝajnis al mi neordinare granda, mi simpatiis kun mia kompatinda hundino, kiu estis graveda, kaj tamen ĉasis rapide kiel ĉiam. Mi mem povis sekvi surĉevale nur en granda distanco. Subite mi ekaŭdis bruon kvazaŭ venanta de aro da hundoj, tamen ĝi estis tiel malforta kaj malklara, ke mi ne sciis la kaŭzon.





Alproksimiĝante mi spertis grandan surprizon. La leporo naskis dum la kurado; la samo okazis al mia hundino dum la ĉasado, kaj estis precize tiom da leporidoj kiom da hundoj. Instinkte la unuaj kuris, kaj la lastaj ĉasis; kaj mi trovis min posedanto de ses leporoj kaj de sama nombro da hundoj ĉe la fino de ĉaso, kiu komenciĝis nur per unu.

Mi memoras ĉi tiun mian mirindan hundinon kun la samaj plezuro kaj amo kiel belegan litovan ĉevalon, kiun mono ne povus aĉeti. Ĝi, fariĝis mia tute hazarde, kaj tio donis al mi okazon montri mian lertecon en ĉevalrajdado en plej bonaj cirkonstancoj. Mi estis gasto, en la belega kampodomo de grafo Przoboski en Litovujo, kaj restis por tetrinko kun la sinjorinoj en la salono, dum la sinjoroj estis ekstere sur la korto por rigardi junan altspiritan ĉevalon, kiu ĵus alvenis el la ĉevalbredejo. Ni subite ekaŭdis alarman bruon; mi rapidis malsupren kaj trovis la ĉevalon tiel neregebla, ke neniu kuraĝis alproksimiĝi al ĝi aŭ surseliĝi. La plej kuraĝaj ĉevalrajdistoj staris konsternitaj kaj en teruro; malespero esprimiĝis sur ĉies vizaĝo, kiam, per unu salto, mi estis sur ĝia dorso. Per tio mi surprizis ĝin kaj poste faris ĝin ĝentila kaj obeema per la plej bona monstro de rajdarto, kiun mi posedis. Por montri tion perfekte al la sinjorinoj kaj por ŝpari al ili la neceson eliri



eksteren, mi devigis la ĉevalon, salti tra la fenestro en la salonon, ĉirkaŭmarŝis kelkajn fojojn, pasis, trotis kaj galopis, kaj fine igis la ĉevalon surtabliĝi, por ripeti la manovrojn sur la

tablo en bela stilo de miniaturo, kio tre plaĉis al la sinjorinoj; ĉar la ĉevaleto faris ĉion mirinde bone kaj rompis nek tason nek teleron. Tio metis min tiel alten en ilia opinio kaj tiel bone en la opinio de la grafo, ke kun sia kutima ĝentileco li petis, ke mi akceptu tiun junan ĉevalon por rajdi ĝin plengalope al venko kaj honoro en la milito kontraŭ la turkoj, kiu baldaŭ devis komenciĝi sub la komando de grafo Münnich.

Mi efektive ne povis ricevi pli agrablan donacon, nek pli bonan antaŭsignon ĉe la malfermo de tiu militiro, en kiu mi lernis mian metion kiel soldato. Ĉevalo tiel milda, tiel altspirita kaj tiel furioza, samtempe ŝafido kaj Bucefalo¹, ĉiam rememorigis al mi klare la devon de soldato kaj ĝentilhomo kaj la mirindajn agojn, kiujn la juna Aleksandro faris sur la batal-kampo.

Ni iris en la militon interalie ankaŭ, kiel ŝajnis, kun la intenco, rebonigi la reputacion de la rusa armeo, kiu malbonfamigis iom per la milito apud la Pruth, kiun gvidis caro Petro; kaj tion ni tute bone plenumis per kelkaj tre lacigaj kaj gloraj militiroj sub la komando de tiu granda generalo, kies nomon mi jam antaŭe menciis.

Modesteco malpermesas al malsuperuloj arogi al si grandajn sukcesojn aŭ venkojn, kies gloro ĝenerate estas propri-gata al la komandantoj aŭ eĉ (kio estas eĉ iom embarasiga) al reĝoj kaj reĝinoj, kiuj neniam flaris pulvon krom ĉe manovroj kaj militoparadoj, neniam vidis batalkampon, nek malamikon en batalaranĝo.

Mi do ne pretendas iun parton de la gloro en la grandaj interbataloj kun la malamiko. Ni ĉiuj faris nian devon, kio, en la lingvo de patrioto, soldato kaj ĝentilhomo, estas tre am-

1 Ĉevalo de Aleksandro la Granda.

pleksa vorto kun granda honoro, signifo kaj graveco, pri kiu la plimulto de la novaĵistoj kaj trinkejaj politikistoj povas havi nur tre malnoblan kaj malestimindan ideon. Tamen, havante korpuson da husaroj sub mia komando, mi faris kelkajn ekspediciojn kun laŭvola aŭtoritato; kaj la sukceso, kiun mi havis, mi povas, laŭ mia opinio, juste kaj sole noti por mia kredito kaj por la kredito de la bravuloj, kiujn mi kondukis al konkero kaj venko. Foje ni havis tre varman laboron en la antaŭgvardio, kiam ni pelis la turkojn en Oczakovon. Mia vigla litova ĉevalo preskaŭ kondukis min en malfeliĉon. Mi havis kun mia korpuso antaŭpostenon kaj vidis la malamikon venanta al ni en nubo da polvo, kiu lasis min iom necerta pri



lia efektiva nombro kaj liaj veraj intencoj. Envolvi min en simila nubo, estus ja nur ordinara prudento, sed ne estus akirinta al mi la necesan scion, nek respondus al la celo, por kiu mi estis sendita; tial mi ordonis al miaj kamaradoj, ambaŭflanke disiri dekstren kaj maldekstren kaj estigi tiom da pol-

vo, kiom ili povis, kaj mi mem iris antaŭen rekte al la malamiko, por havi pli proksiman vidon. En ĉi tio mi sukcesis, ĉar la malamiko haltis kaj ekbatalis, sed ne tre longe, ĉar la timo pro miaj flankuloj repelis lin iom en malordo. Ĉi tiu estis la momento por ataki la malamikajn vicojn kun spirito; mi tute



disrompis ilian kunecon, faris teruran pereigon al ili kaj forpelis ilin ne nur returne al la ĉirkaŭmurita urbo, sed eĉ tra la muro, tute kontraŭ niaj plej sangavidaj esperoj.

La rapideco de mia litova ĉevalo ebligis al mi esti la plej antaŭa postkuranto; kaj vidante la malamikon preskaŭ fluganta tra la kontraŭa pordego de la urbo, mi pensis, ke estus prudente, halti sur la foira placo por reformi la vicojn de mia korpuso. Mi haltis, sinjoroj; sed imagu mian surprizegon, kiam mi sur ĉi tiu placo ne vidis ĉirkaŭ mi eĉ unu el miaj husaroj! Ĉu ili trasercas la aliajn stratojn, aŭ kio okazis al ili? ili ne povas esti malproksime kaj certe baldaŭ alvenos. — En tiu atendado mi trotigis mian spiregantitan litovan ĉevalon al fonto sur la placo kaj lasis ĝin trinki. Ĝi trinkis pli ol ordinare kaj kun avido ne kontentigebla; tamen tio estis tute natura: rigardante ĉirkaŭen por trovi miajn soldatojn, kion mi ekvidis, sinjoroj? La malantaŭa parto de la kompatinda kreitaĵo — gluteo kaj kruroj — mankis, kvazaŭ la ĉevalo estus distrancita



en du pecojn, kaj la akvo elfluis, kiel ĝi eniris, ne refreŝigante la beston, nek farante al ĝi ion bonan! Kiel tio povis okazi, estis por mi tuta mistero, ĝis kiam mi revenis kun la ĉevalo al la urba pordego. Tie mi vidis, ke kiam mi enkuregis rapidege post la forkuranta malamiko, oni malsuprenigis la pordokulison (peza falpordo kun akraj pinteĝoj ĉe la malsupraĵo, kiun oni faligas subite por malebligi al malamiko eniron en fortikigitan urbon) ne vidatan de mi, kaj ĝi tute detranĉis la malantaŭan parton de mia ĉevalo, kaj tiu parto ankoraŭ kuŝis tremetante ekster la pordego. Tio estus por mi neriparebla perdo, se la hufferaĵisto ne sukcesus kunigi ambaŭ partojn, dum ili ankoraŭ estis varmaj.

Li kunkudris ilin per branĉetoj kaj junaj plantaĵoj de laŭroj, kiujn li trovis apude; la vundo resaniĝis, kaj, kio povis okazi nur al tia glora ĉevalo, la branĉetoj enradikiĝis en la korpo, elkreskis kaj formis laŭbon super mi tiel, ke poste mi povis iri al multaj ekspedicioj en la ombro de miaj laŭroj kaj tiuj de mia ĉevalo.

Ĉapitro VI

La barono fariĝas militkaptito kaj estas vendata kiel sklavo, — paŝtas la abelojn de la Sultano, kiuj estas atakataj de du ursoj. — Li perdas unu el siaj abeloj; arĝenta hakilo, kiun li! ĵetas al lia ursoj, resaltas kaj flugas supren al la luno; li alportas ĝin per genia eltrovo, falas surteren dum reveno de la luno, sed sukcesas eligi sin el Ja truo en la grundo.

Li elturnigas el malfacila situacio sur mallarĝa vojo, kie li renkontas kaleŝon, en maniero neniam antaŭe provita aŭ farita. — La mirinda efiko de la frosto al la franca korno de lia servisto.

Mi ne ĉiam sukcesis. Mi foje havis la malfeliĉon esti superfortigata de pli granda nombro da soldatoj kaj fariĝi milita kaptito; kaj, kio estas pli abomena, sed ĉiam kutima inter la turkoj, esti vendata kiel sklavo. (La barono poste trovis grandan favoron ĉe la grandsinjoro, kiel evidentiĝos baldaŭ.) En tiu stato de humileco mia ĉiutaga tasko ne estis tre malfacila kaj laboriga, sed iom stranga kaj enuiga. Tio estis peli ĉiumatene la abelojn de la sultano al ilia paŝtejo, gardi





ilin dum la tuta tago kaj ĉe noktigo repeli ilin al la abelujo. Unu vesperon mi rimarkis la foreston de unu abelo kaj baldaŭ rimarkis, ke du ursoj atakis ĝin, por disŝiri ĝin pro la mielo, kiun ĝi portis. Mi havis en la manoj neniun atakilon krom la arĝenta hakilo, kiu estas la insigno de la sultanaj ĝardenistoj kaj farmistoj. Mi ĵetis ĝin al la rabistoj kun la intenco fortimigi ilin kaj liberigi la kompatindan abelon; sed per malfeliĉa turnigo de mia mano ĝi flugis supren kaj daŭre leviĝis,

ĝis kiam ĝi atingis la lunon. Kiel ricevi ĝin returne? Kiel venigi ĝin malsupren? Mi memoris, ke turkaj faboj kreskas tre rapide kaj atingas mirindan altecon. Mi tuj plantis unu el ili; ĝi elkreskis kaj eĉ alkroĉiĝis al unu el la kornoj de la luno. Mi nun devis nur grimpi sur ĝi ĝis la luno, kiun mi baldaŭ tre bone atingis. Estis malfacila afero trovi mian arĝentan hakiĵon en loko, kie ĉio ĉirkaŭe havas la brilecon de arĝento; fine tamen mi trovis ĝin inter amaso da grenventumaĵo kaj dishakita pajlo. Mi nun volis reveni; sed ho ve! la varmego de la




suno sekigis mian fabon: ĝi estis tute senutila por mia malsupreniro. Mi do komencis labori kaj faris ŝnuregon el tiu dishakita pajlo, tiel longan kaj bonan, kiel mi povis. Tiun ŝnuregon mi ligis al unu el la lunaj kornoj, kaj deglitis ĝis la fino. Ĉi tie mi tenis min firme per la maldekstra mano, kaj per la hakilo en mia dekstra mano mi tranĉis la longan nun senutilan finon de la supra parto de la ŝnuro kaj alligis ĝin al la malsupra parto; tio portis min sufiĉe longan distancon pli malsupren. Tiu ripetita splisado kaj kunligado de la ŝnuro ne plibonigis ĝian kvaliton, nek portis min ĝis la tero de la sultana farmbieno. Mi estis en la distanco de almenaŭ kvar aŭ kvin mejloj de la tero, kiam ĝi ŝiriĝis. Mi falis sur la teron kun tiel mirinda rapideco kaj forteco, ke mi trovis min senkonscia en truo almenaŭ naŭ klaftojn profunda, farita de la pezo de mia korpo falinta el tia alteco; mi rekonsciiĝis, sed ne sciis, kiel eliri el ĝi; tamen mi elfosis ŝtupojn per miaj ungoj kaj facile sukcesis eliri.

Baldaŭ poste paco estis aranĝita kun la turkoj, kaj akirinte mian liberigon, mi forlasis Peterburgon en la tempo de tiu stranga revolucio, dum kiu la imperiestro en sia lulilo, lia patrino, la duko de Brunsvigo, ŝia patro, feldmarŝalo Münnich kaj multaj aliaj estis sendataj en Siberion. La vintro estis tiam



tiel eksterordinare severa en tuta Eŭropo, ke la suno de tiu tempo ŝajnis esti frostvundita. Revenante al ĉi tiu urbo, mi spertis survoje pli grandajn maloportunaĵojn, ol estis tiuj, kiujn mi spertis dum mia vojaĝo al Ruslando.


Mi veturis per la poŝto, kaj trovante min sur mallarĝa vojeto, mi ordonis al la veturigisto, ke li signalu per sia korno, por ke aliaj vojaĝantoj ne renkontu nin sur la mallarĝa trapa-



sejo. Li blovis per ĉiuj fortoj, sed liaj penoj estis vanaj, li ne povis sonigi la kornon. Pri tio mi ne sciis la kaŭzon, kaj tio estis iom malfacila afero, ĉar tuj poste ni trovis nin kontraŭ alia kaleŝo venanta el la kontraŭa direkto. Oni ne povis plu-iri; tamen mi eliris el mia kaleŝo, maljungis la ĉevalojn, kaj estante iom forta, mi metis la tutan kaleŝon, eĉ kun la radoj kaj ĉiu enhavo, sur mian kapon; nun mi saltis trans barilon,



kiu havis la altecon de naŭ futoj (kio ĉe tiel tre peza kaleŝo estis iom malfacila tasko), sur kampon kaj per alia salto venis returne sur la vojon post la alia kaleŝo. Poste mi reiris pro la ĉevaloj, kaj lokinte unu sur mian kapon kaj la alian sub mian brakon, per la sama metodo kiel antaŭe portis ilin al mia kaleŝo, aljungis ilin kaj veturis al gastejo ĉe nia haltejo. Mi devas klarigi, ke la ĉevalo sub mia brako estis tre vigla kaj havis ne pli ol kvar jarojn; dum mia dua salto trans la barilon ĝi esprimis grandan malamon al tia perforta metodo per piedbato kaj ekleko; tamen mi regis ĝiajn malantaŭajn piedojn, metante ilin en mian poŝon. Alveninte antaŭ la gastejo, mia



veturigisto kaj mi refreŝigis nin; li pendigis sian kornon sur najlon apud la kuireja fajro; mi sidis ĉe la alia flanko.

Subite ni aŭdis tereng! tereng! tereng! teng! teng! Ni rigardis ĉirkaŭen kaj nun trovis la kaŭzon, kial la veturigisto ne povis sonigi la kornon antaŭe: la sonoj estis frostiĝintaj en la korno kaj nun elvenis dum degelado tute klare kaj multe je la honoro de la veturigisto, tiel ke la honestulo distris nin dum iom da tempo per diversaj melodioj, sen meti sian buŝon al la korno. *La reĝo de Prusujo* — marŝo — *Super montoj, super valoj* — kaj multaj aliaj amataj melodioj eliĝis. Fine la degela distraĵo finigis, ĝuste kiel ĉi tiu mallonga rakonto pri miaj vojaĝoj en Ruslando.

Kelkaj vojaĝantoj facile rakontas pli multe ol eble estas vere; se iu inter la ĉeestantoj havas dubon pri mia veremo, mi nur povas diri al tiuj, ke mi kompatas ilian mankon de fido, kaj devas peti, ke ili forlasu nin, antaŭ ol mi komencos la duan parton de miaj aventuroj, kiuj estas tiel same bazitaj sur vero kiel tiuj jam rakontitaj.

PARTO II

Ĉapitro VII

La barono rakontas pri siaj aventuroj dum vojaĝo al Nord-Ameriko, kiuj bone meritas la atenton de la leganto. Petolaĵoj de baleno. — Mevo savas la vivon de maristo. — La kapo de la barono estas perforte premegita en lian stomakon. — Li lerte ŝtopas danĝeran akvoenfluan en la ŝipo laŭ kurioza maniero.


Mi enŝipigis en Portsmouth en unuaklasa angla batalŝipo kun cent kanonoj kaj dek kvar centoj da maristoj, por iri al Nord-Ameriko. Nenio rakontinda okazis, ĝis ni estis en distanco de tricent mejloj de la rivero Sankta Laŭrenco, kiam la ŝipo koliziis kun terura forto al (kiel ni supozis) roko; tamen, ĵetante la sondilon, ni ne povis trovi fundon, eĉ ne ĉe tricent klaftoj. Kio igis ĉi tiun cirkonstancon pli mirinda kaj efektive tute ne komprenebla, estis, ke la forteco de la kolizio estis tia, ke ni perdis la direktilon, nia busprito rompiĝis en la mezo, kaj ĉiuj niaj mastoj fendiĝis de la supraĵo ĝis la malsupraĵo, kaj du el ili falis sur la ferdekon; unu kompatinda maristo, kiu estis supre faldanta la ĉefan velon, estis ĵetita minimume tri mejlojn for de la ŝipo, sed li feliĉe savigis, ektenante la voston de granda mevo, kiu reportis kaj lokis lin ĝuste sur la punkto, el kiu li estis ĵetita. Alia pruvo pri la grandeco de la kolizio estis la forteco, kun kiu la maristoj inter la



ferdekoj estis pelataj kontraŭ la plankoj super ili; mia kapo, ekzemple, estis premita en mian stomakon, kie ĝi restis dum kelkaj monatoj, antaŭ ol ĝi revenis al sia natura situo. Dum ni ĉiuj estis en stato de mirego sekve de la ĝenerala neklarigebla konfuzo, en kiu ni estis envolvitaj, la tuta afero subite klariĝis per la apero de granda baleno, kiu estis ripozinta en dormo, en distanco de proksimume dek ses futoj de la supraĵo de la akvo. Ĉi tiu besto estis tiel malkontenta pri la maltrankvileco, kiun kaŭzis al ĝi nia ŝipo, ĉar dum nia irado ni gratis ĝian nazon, ke ĝi enbatis la tutan galerion kaj parton de



la antaŭa ferdeko per sia vosto kaj preskaŭ en la sama momento forprenis per siaj dentegoj la ĉefankron, kiu pendis, kiel kutime, ĉe la kilo, kaj forkuris kun la ŝipo, minimume sesdek mejlojn kun rapideco de dek du mejloj dum horo; feliĉe la kablo ŝiriĝis, kaj ni perdis ambaŭ, kaj la balenon kaj la ankron.



Tamen, revenante al Eŭropo post kelkaj monatoj, ni trovis, en distanco de kelkaj mejloj apud la sama loko, la saman balenon drivanta malviva sur la akvo; ĝi havis longecon de pli ol duonmejlo.


Povante preni sur la ŝipon nur malgrandan parton de tiu monstro, ni eligis niajn boatojn kaj kun granda malfacileco detranĉis ĝian kapon, en kiu, je nia granda ĝojo, ni trovis nian ankron kaj pli ol kvardek klaftojn de nia kablo; ambaŭ estis kaŝitaj en la maldekstra flanko de ĝia buŝego, ĝuste sub la lango. (Eble tio estis la kaŭzo de ĝia morto, ĉar tiu parto de ĝia lango estis multe ŝvelinta kun forta brulumo.) Ĉi tiu estas la sola eksterordinara cirkonstanco, kiu okazis dum ĉi tiu vojaĝo. Unu parton de nia fatalo mi tamen preskaŭ forgesis: dum la baleno forkuris kun la ŝipo, la ŝipo iom fendigis, kaj akvo komencis enverŝiĝi tiel rapide, ke ĉiuj niaj pumpiloj ne povus savi nin de surfundiĝo; feliĉe mi unue trovis la difekton. Mi trovis, ke ĝi estas granda truo, proksimume unu futo en la diametro. Vi kompreneble supozos, ke ĉi tiu cirkonstanco faras al mi senfinan plezuron, se mi informos vin, ke tiu bela ŝipo estis savita kun ĝia tuta maristaro per plej feliĉa penso! Unuvorte, mi sidigis min sur la truon, kaj mi estus povinta ĉesigi la enfluan de la akvo, eĉ se la truo estus estinta pli granda; vi ne miros pri tio, se mi informos vin; ke mi devenas de holandaj gepatroj.

Mia situacio, dum mi sidis tie, estis iom malvarma, sed la ĉarpentista arto baldaŭ liberigis min.

Ĉapitro VIII

La barono banas sin en la Mediteranea maro — renkontas neatenditan gaston — venas senintence en regionon de varmeĝo kaj mallumo, el kiu li estas liberigita per la korn-pipa¹ danco. Li timigas siajn savantojn kaj revenas sur la teron.

Unu fojon mi estis en granda danĝero esti perdita en plej stranga maniero en la Mediteranea maro. Mi banis min en tiu agrabla maro apud Marseilles iun someran posttagmezon, kiam mi vidis tre grandan fiŝon, kun makzeloj larĝe malfermitaj, kiu alproksimiĝis al mi kun plej granda rapideco; ne estis tempo por perdi, mi ne povis ĝin eviti. Mi tuj malgrandi-



- 1 Korn-pipa danco estas speco de danco, kiu estas falata per lapida kaj vigla movado de la piedoj. Ĝi estas ĉefe skota danco kaj nomigas "Horn-pipe".

gis mian korpon kiel eble plej multe, kunmetante miajn piedojn kaj metante miajn manojn proksime al miaj flankoj; en tiu pozicio mi pasis inter ĝiaj makzeloj kaj en ĝian stomakon, kie mi restis dum kelka tempo en plena mallumo kaj komforta varmo, kiel vi ja povas supozi; fine mi pensis, ke se mi faros al ĝi doloron, ĝi volonte elĵetos min. Havante sufiĉan spacon, mi ekludis miajn petolaĵojn, turnis min, dancetis, paŝis kaj saltis, sed nenio ŝajne tiel maltrankviligis ĝin, kiel la rapida movado de miaj piedoj, kiam mi provis danci la korn-pipan dancon. Tuj post kiam mi komencis tion fari, ĝi malebligis mian dancon per subitaj konvulsioj kaj ekstretoj; mi persistis. Fine ĝi ekkriis terure kaj ekstaris preskaŭ vertikale en la akvo, kun ĝia korpo kaj ĝiaj ŝultroj ekster la akvo, kaj pro tio ĝi estis vidata de maristoj sur preterpasanta itala ŝipo; ili harpunis ĝin en kelkaj minutoj. Kiam oni levis ĝin sur la ferdekon, mi aŭdis la maristojn diskutantaj pri la plej bona maniero ĝin distranĉi, por konservi kiel eble plej grandan kvanton da oleo. Komprenante la italan lingvon, mi havis teruran antaŭtimon, ke la iloj uzotaj por tiu procedo ankaŭ pereigos min; tial mi staris tiel proksime al la centro, kiel estis eble, ĉar en la stomako de ĉi tiu kreitaĵo estis sufiĉe da spaco por dekduo da homoj, kaj mi kompreneble supozis, ke ili komencos ĉe la ekstremaĵo.. Tamen miaj timoj baldaŭ ĉesis, ĉar ili komencis malfermi la malsupran parton de la ventro. Ekvidante brileton de lumo, mi forte kriis por esti liberigita el mia situacio, en kiu mi preskaŭ sufokiĝis. Estas por mi neeble doni ĝustan priskribon de la grado kaj speco de la mirego, kiu sidis sur ĉies vizaĝo, kiam oni aŭdis homan voĉon, kiu eliĝis el la interno de fiŝo, kaj tiom pli multe, kiam oni vidis nudan homon promenanta rekte el ĝia korpo.




Unuvorte, sinjoro, mi rakontis al ili la tutan historion, kiel mi rakontas ĝin al vi, dum mirego frapis ilin ĝis muteco. Refreŝiĝinte min kaj saltinte en la maron por min purigi, mi na-

ĝis al miaj vestoj, kiuj kuŝis sur la marbordo, kie mi antaŭe lasis ilin. Kiom mi povas kalkuli, mi estis malliberigita en la stomako de tiu besto preskaŭ kvar horojn kaj duonon.

Ĉapitro IX

Aventuroj en Turkujo kaj sur la rivero Nilo. — Li vidis balonon super Konstantinopolo; alpafas kaj faligas ĝin; trovas en ĝi francan eksperimentan filozofon. — Li iras pro misio al Kairo kaj revenas sur la Nilo, kie li estas ĵetata en neatenditan situacion kaj retenata tie ses semajnojn.

Kiam mi estis en la servo de la turkoj, mi ofte amuzis min en plezur-boatoj sur la Marmara maro, de kiu oni havas belegan perspektivon de la tuta urbo Konstantinopolo, inkluzive de la serajlo de la Grandsinjoro. Iun matenon, admirante la belecon kaj serenecon de lia ĉielo, mi rimarkis en la aero globforman objekton, kiu ŝajne havis la grandecon de dekdu-cola globeto kun io pendanta sub ĝi. Mi tuj elprenis mian plej grandan kaj plej longtuban birdopafilon, sen kiu mi neniam vojaĝas aŭ eĉ faras iun ekskurson, se mi povas eviti tion; mi ŝargis ĝin per kuglo kaj pafis al la globo, sed sen rezulto, ĉar la objekto estis en tro granda distanco. Mi tiam enmetis du-oblan kvanton da pulvo kaj kvin aŭ ses kuglojn: ĉi tiu dua provo sukcesis; ĉiuj kugloj efikis, deŝiris unu flankon de la globo kaj ĝin malsuprenigis. Imagu mian surprizon, kiam lukse orumita ĉaro, pendanta sub grandega balono kaj havanta en si homon kaj parton de ŝafo, ŝajne rostitan, falis en sesfuta distanco de mi. Kiam mia surprizego en certa grado malpli-




iĝis, mi ordonis al miaj ŝipistoj remi proksime al tiu stranga aerovojaĝanto.

Mi akceptis lin sur la ferdeko de mia barko (li estis franco). Li estis tre senfortigita de la subita falo en la maron kaj ne ka-



pabla paroli; post iom da tempo li tamen refortiĝis kaj rakontis pri si jenon: "Antaŭ sep aŭ ok tagoj — mi ne povas precize diri kiam, ĉar mi perdis mian kalkulpovon, estinte dum la pli granda parto de la tempo tie, kie la suno neniam subiĝas — mi leviĝis aeren de Lands End en Kornvalo, sur la insulo Granda Britujo, en la ĉaro, el kiu oni ĵus prenis min, pendiĝita sub tre granda balono, kaj prenis kun mi ŝafon, por fari per ĝi atmosferajn eksperimentojn. Malfeliĉe la vento ŝanĝiĝis dum la unuaj dek minutoj tuj post mia suprenigo, kaj anstataŭ iri al Exeter, kie mi intencis surterigi, mi estis pelata en




la direkto al la maro, super kiu, kiel mi supozas, mi restis ĝis nun, tamen multe tro alte por fari iajn observojn.

”La alvokoj de malsato estis tiel premigaj, ke la intencitaj eksperimentoj pri varmego kaj spirado cedis al ili. En la tria tago mi estis devigata, buĉi la ŝafon pro nutraĵo; kaj troviĝante tiutempe multe pli alte ol la luno kaj post pli ol dek ses horoj tiel proksime al la suno, ke ĝi bruldifektis miajn brovojn, mi lokis la kadavron de la ŝafo, post zorga senfeligo, en tiu parto de la ĉaro, kie la suno havis sufiĉan potencon, aŭ alivorte, kie la balono ne ombris ĝin de la suno; per tiu metodo ĝi estis bonege rostita dum proksimume du horoj. Ĉi tio estis mia nutraĵo ĝis nun.” Ĉi tie li paŭzis kaj ŝajnis esti perdita en pensoj, rigardante la objektojn ĉirkaŭe. Kiam mi sciigis al li, ke la konstruaĵo antaŭ ni estas la serajlo de la grandsinjoro en Konstantinopolo, li ŝajnis tre konsternita, ĉar li supozis esti en tuta alia loko.


”La kaŭzo” — li aldonis — ”de mia longa flugado estis malfunkciigo de ŝnureto, kiu estis fiksita al valvo en la baliono kaj celis la ellason de la bruliĝema gaso; kaj se la balono ne estus alpaŝita kaj la ŝnureto disŝirita en la antaŭdirita maniero, eble mi, kiel Mahometo, estus pendanta inter la ĉielo kaj la tero ĝis la tago de la lasta juĝado.”

* * *

La grandsinjoro, al kiu mi estis prezentita de la ambasadoroj de Rusujo kaj Francujo, dungis min por aranĝi gravan aferon en Kairo; ĝi estis de tia speco, ke ĝi devas por ĉiam resti sekreto. Mi iris tien surtere kun granda ceremonio; plenuminte tie la aferon, mi maldungis preskaŭ ĉiujn miajn servistojn kaj revenis kiel privata sinjoro. La vetero estis ĝojiga, kaj tiu fama rivero, la Nilo, estis nepriskribeble belega; unuvorte:




min venkis la tento lui barkon por malsuprenveturi al Aleksandrio. La trian tagon de mia vojaĝo la rivero komencis leviĝi mirindege (vi ĉiuj aŭdis, mi supozas, pri la ĉiujara inundo de la Nilo), kaj en la sekvanta tago ĝi etendiĝis super la tuta lando, multajn mejlojn ambaŭflanke! En la kvina tago, ĉe la sunleviĝo, mia barko intermiksiĝis kun io, kion mi unue kon-





sideris arbetaĵo; sed kiam pliheliĝis, mi trovis min ĉirkaŭata de migdaloj, tute maturaj kaj en plej alta perfekteco. Sondante la profundecon de la akvo, miaj ŝipistoj trovis, ke ni estis minimume sesdek futojn de la tero, ne povante iri antaŭen nek malantaŭen.

Je ĉirkaŭ la oka aŭ naŭa horo, tiel proksimume, kiel mi povis juĝi laŭ alteco de la suno, la vento subite leviĝis kaj klinis mian barkon unuflanken; nun ĝi pleniĝis de akvo, kaj mi ne vidis ĝin dum kelka tempo. Feliĉe ni ĉiuj savis nin (ses viroj kaj du knaboj), tenante firme la arbon, kies branĉoj estis sufiĉe fortikaj por nia pezo, sed ne por la pezo de la barko. En tiu situacio ni restis ses semajnojn kaj tri tagojn, nutrante nin per la migdaloj; mi ne bezonas informi vin, ke ni havis sufiĉegon da akvo. En la kvardekdua tago de nia malfeliĉo la akvo malleviĝis tiel rapide, kiel ĝi leviĝis, kaj en la kvardeksesa ni povis meti niajn piedojn sur la firman teron.





Nia barko estis la unua agrabla objekto, kiun ni vidis, proksimume sescent futojn for de la loko, kie ĝi subakvigis. Sekinginte ĉion utilan per la varmego de la suno kaj ŝarginte nin per necesajoj el la provizoj sur la barko, ni ekvojiris por trovi nian perditan direkton; ni trovis, laŭ la plej ĝusta kalkulo, ke ni estis portitaj trans ĝardenmurojn kaj diversajn barilojn, pli ol cent kvindek mejlojn.

Post kvar tagoj, post tre laciga piedirado en maldikaj ŝuoj, ni atingis la riveron; kiu nun jam estis inter la limoj de siaj bordoj, rakontis niajn aventurojn al knabo, kiu afable kontentigis ĉiujn niajn bezonojn kaj sendis nin antaŭen en sia barko. Post ses tagoj ni alvenis en Aleksandrio, kie ni enŝipiĝis por Konstantinopolo. La grandsinjoro akceptis min afable, kaj mi havis la honoron vidi la serajlon, al kiu lia moŝto mem prezentis min.



Ĉapitro X


Li vizitas malnovan amikon, generalon Elliot, dum la sieĝo de Gibraltaro — surfundigas hispanan batalŝipon — vekas maljunan virinon sur la afrika marbordo — detruas ĉiujn kanonojn de la malamiko — timigas la grafon D'Artois kaj sendas lin al Parizo — savas la vivon de du anglaj spionoj per la sama ŝtonĵetilo, kiu mortigis Goljaton, kaj disrompas la sieĝon.

Dum la antaŭnelonga sieĝo de Gibraltaro mi iris kun provianta ŝiparo, sub la komando de Lord Rodney, por vidi mian malnovan amikon generalon Elliot, kiu, per sia majstra defendo de tiu loko, akiris laŭrojn neniam velkontajn. Post kiam la komuna ĝojo, kiu kutime regas ĉe renkontiĝo de malnovaj amikoj, iom malpliiĝis, mi iris por ekzameni la staton de la garnizono kaj vidi la movojn de la malamiko; ĉe tio la generalo akompanis min. Mi kunportis el Londono bonegan reflektan teleskopon, aĉetitan ĉe Dollond; per ĝia helpo mi trovis, ke la malamiko tiutempe intencas pafi per trideksesfunta kanono al la punkto, kie ni staris. Mi sciigis al la generalo ilian intencon; li ankaŭ rigardis tra la teleskopo kaj trovis miajn konjektojn ĝustaj. Mi tuj, kun lia permeso, ordonis, ke oni venigu el proksima baterio kvardekokfuntan kanonon,

kiun mi lokis kun tia ĝusteco (studinte delonge la arton de artilerio), ke mi estis tute certa pri mia celataĵo.

Mi rigardadis la malamikon, ĝis kiam mi vidis la alumeton metitan al la tuŝtruo de ties kanono; ĝuste en tiu sama mo-





mento mi signalis, ke ankaŭ nia kanono estu pafigata. Ĉirkaŭ mezvoje inter la du kanonoj la kugloj kunpuŝiĝis kun terura forteco, kaj la efiko estis mirindega. La malamika kuglo resaltis kun tia fortego, ke ĝi mortigis la soldaton, kiu ĝin pafis, forportante lian kapon kune kun dek ses aliaj kapoj, kiujn ĝi renkontis en sia irado al la marbordo de Berberujo. Tie ĝia potenco, post kiam ĝi trairis tri mastojn de ŝipoj, kiuj tiam staris en linio unu post alia en la haveno, fine estis tiel eluzita, ke ĝi povis trapati nur la tegmenton de kabano de malriĉa laboristo, ĉirkaŭ sescent futojn enlande; tie ĝi rompis la kelkajn restintajn dentojn de maljuna virino, kiu dormis surdor-




se kun malfermita buŝo. La kuglo lokiĝis en ŝia gorĝo. Ŝia edzo tuj poste venis hejmen kaj provis eltiri la kuglon, sed trovante tion nefarebla, li perforte enpuŝis ĝin per helpo de martelego en ŝian stomakon, el kiu ĝi poste eliĝis laŭ natura vojo.





Nia kuglo faris bonegan servon; ĉar ĝi ne nur rebatis la alian kuglon en la maniero priskribita, sed pluirante, kiel mi intencis, ĝi malmuntis la saman kanonon, kiu ĵus estis uzita kontraŭ ni, kaj sendis ĝin perforte en la internon de la ŝipo, kien ĝi falis kun tia forto, ke ĝi trarompis la kilon. La ŝipo tuj pleniĝis de akvo kaj surfundiĝis kun pli ol mil hispanaj maristoj sur ĝi krom grandeta nombro da soldatoj. Ĉi tio, kompreneble, estis tre eksterordinara faro; mi tamen ne prenos la tutan meriton sur min mem: mia juĝo estis la ĉefa rimedo, sed la sorto iom helpis; ĉar mi poste trovis, ke la viro, kiu ŝargis mian kanonon, erare enmetis duoblan kvanton da pulvo; alie ni ne estus sukcesintaj tiom super ĉuj supozoj, precipe ĉe la rebato de la malamika kuglo.

Generalo Elliot volis honori min pro tiu stranga servo per





rango de oficiro; sed mi rifuzis ĉion, esceptante lian dankon, kiun mi ricevis en ĉeesto de grupo da oficiroj ĉetablignitaj por vespermanĝo en tiu sama tago.

Estante tre amika al la angloj, kiuj sendube estas brava popolo, mi decidis, ne forlasi la garnizonon, ĝis kiam mi faris al ili alian servon, kaj post ĉirkaŭ tri semajnoj okazo sin prezentis. Mi alivestigis min per robo de romeklezia pastro, kaj ĉirkaŭ la unua horo matene mi ŝteliris el la garnizono, trapasis la malamikan linion kaj alvenis en la mezo de ilia tendaro, kie





mi eniris en la tendon de princo D'Artois, la ĉefa komandanto, kaj aliaj oficiroj, kiuj sidis en profunda interkonsiliĝo, koncentriĝantaj pri plano atakegi nian garnizonon en la sekvanta mateno. Mia alivestiĝo estis mia protekto; ili permesis mian daŭran ĉeeston tie, kaj mi aŭdis ĉion diritan ĝis ilia enlitiĝo. Kiam mi trovis la tutan tendaron, eĉ la gardostarantojn, envolvitaj en la brakoj de Morfeo, mi komencis mian laboron; ĝi konsistis el tio, ke mi malmuntis ĉiujn kanonojn (ĉirkaŭ tricent de kvardekok- ĝis dudekkvarfuntaj kanonoj, kaj forĵetis ilin tri mejlojn en la maron. Havante neniun helpon, mi trovis ĉi tion la plej malfacila tasko, kiun mi iam entreprenis,

escepte de la naĝado al la kontraŭa bordo kun la fama turka kanono, priskribita de barono Tott en siaj memoraĵoj, kion mi intencas mencii iom poste. Mi tiam amasigis kune en la centro de la tendaro ĉiujn kanon-veturilojn, kiujn mi, por eviti la aŭdeblan bruon de la radoj, portis duope sub miaj brakoj. Vere belan aspekton prezentis la amasigitaĵo minimume tiel alte kiel la roko de Gibraltaro. Poste mi ekbruligis meĉaĵon, skrapante silikan ŝtonon, kiu kuŝis dudek futojn profunde en





la tero (en malnova muro konstruita de la maŭroj, kiam ili invadis Hispanujon), per ŝargujo de fera kvardefunta kanono, kaj tiel bruligis la tutan amason. Mi forgesis informi vin, ke mi ĵetis ĉiujn municiajn vagonojn sur la supraĵon de la amaso.

Antaŭ ol mi almetis la brulantan meĉaĵon, mi metis la plej brulemajn aĵojn malsupren tiel lerte, ke la tutaĵo estis unu flamego post momento. Por eviti suspekton, mi kiel unu el la unuaj faris alarmon. La tuta tendaranaro estis, kiel vi povas supozi, ŝtonigita pro surprizo: la komuna konkludo estis, ke ilia gardistaro estis subaĉetita kaj ke sep aŭ ok regimentoj de la garnizono okupiĝis per tiu terura detruo de la kanonaro. Sinjoro Drinkwater en sia rakonto pri tiu fama sieĝo mencias la malamikan suferon de granda perdo kaŭze de brulego, kiu okazis en ĝia tendaro, sed li neniam sciis la kaŭzon; kiel li povis tion scii? Mi mem neniam malkaŝis ĝin ĝis nun (kvan-

kam mi sola savis Gibraltaron per ĉi tiu nokta faro), eĉ ne al generalo Elliot. Grafo D'Artois kaj ĉiuj liaj kunuloj forkuris en timo kaj ne haltis survoje ĝis Parizo, kiun ili atingis post ĉirkaŭ dek kvar tagoj; tiu terura brulego havis tian malfeliĉan rezulton ĉe ili, ke ili ne kapablis manĝi ion dum tri monatoj poste, sed, kiel kameleonoj, vivis per aero.


Se iu sinjoro volas diri, ke li pridubas tiun rakonton, mi igos lin punpagi kvin litrojn da brando kaj trinki ĝin en unu engluto.



Proksimume du monatojn post kiam mi faris ĉi tiun servon al la sieĝitoj, iun matenon, dum mi sidis kun generalo Elliot ĉe matenmanĝo, bombo (ĉar mi ne havis la tempon, detruiri iliajn bomboĵetilojn kune kun iliaj kanonoj) flugis en la ĉambron, kie ni sidis; ĝi falis sur nian tablon. La generalo, kion la plej multaj aliaj homoj estus farintaj, tuj forlasis la ĉambron; sed mi prenis la bombon, antaŭ ol ĝi eksplodis kaj portis ĝin al supraĵo de la roko. Tiam, superrigardante la malamikan



tendaron sur altaĵo apud la marbordo mi rimarkis nombron da homoj, sed per mia nuda okulo mi ne povis vidi, kion ili faras. Mi denove uzis mian teleskopon; tiam mi trovis, ke du el niaj oficiroj, unu generalo kaj la alia kolonelo, kun kiuj mi pasigis la antaŭan vesperon kaj kiuj dumnokte estis en la malamika tendaro kiel spionoj, estis kaptitaj, kaj en tiu sama momento oni estis ekzekutonta ilin sur eŝafodo. Mi trovis, la distancon tro granda por ĵeti la bombon per mia mano, sed plej feliĉe rememorante, ke mi havas en mia poŝo tiun saman ŝtonĵetilon, kiu helpis Davidon mortigi Goljaton, mi metis la bombon en ĝin kaj tuj ĵetis ĝin meze en la rondon. Ĝi eksplodis falante kaj mortigis ĉiujn ĉeestantojn, escepte de la du akuzitoj, kiuj estis savitaj pro tio, ke ili ĵus estis alten trenitaj; tamen unu el la pecoj de la bombo flugis per tia forto ĝis la piedo de la eŝafodo, ke ĝi tuj faligis ĝin. Niaj du amikoj, tuj kiam ili eksentis firman teron, rigardis ĉirkaŭen por trovi la



kaŭzon; kaj vidinte, ke la gardistoj, la ekzekutistoj kaj ĉiuj aliaj decidis morti unue, ili tuj liberigis unu la alian el la hontigaj ŝnuroj kaj poste kuris al la marbordo, kaptis hispanan boaton kun du viroj en ĝi kaj devigis ilin remi al unu el niaj ŝipoj, kiun ili atingis bone. Post kelkaj minutoj, kiam mi rakontis al generalo Elliot, kiel mi agis, ili ambaŭ prenis miajn manojn, kaj post reciproka gratulo ni iris por pasigi la tagon en festonado.

Ĉapitro XI


Interesa rakonto pri la prauloj de la barono. — Kverelo pri la ĝusta loko, kie staris la arkeo de Noaĥo. — La historio de la ŝtonĵetilo kaj ĝiaj ecoj. Favorata poeto estas prezentata sub ne tre delikataj aŭspicioj. — La obstineco de reĝino Elizabeto. — La patro de la barono transiras la markolon inter Anglujo kaj Holando sur marĉevalo, kiun li poste vendas por sepcent dukatoj.

Vi deziras (mi povas vidi tion sur viaj vizaĝoj), ke mi donu al vi informon, kiamaniere mi fariĝis posedanto de tia trezoro, kia estas la ŝtonĵetilo menciita antaŭ nelonge. (Ĉi tie faktoj devas esti tenataj en sankteco). Jen kiel tio okazis: Mi devenas de la edzino de Urjo, kiun ni ĉiuj konas kiel intumilino de David; ŝi naskis kelkajn infanojn al lia reĝa moŝto; foje la geedzoj kverelis pri afero de granda graveco, t. e. pri la ĝusta loko, kie la arkeo de Noaĥo estis konstruita kaj kie ĝi ripozis post la diluvo. Disiĝo rezultis. Ŝi ofte aŭdis Davidon parolanta pri lia ŝtonĵetilo kiel lia plej valora trezoro. Ŝi ŝtelis ĝin en la nokto de la disiĝo, sed oni sciigis pri la ŝtelo, antaŭ ol ŝi forlasis lian regnon, kaj ne malpli ol ses el liaj gardistoj postkuris ŝin. Tamen, mem uzante la ŝtonĵetilon, ŝi trafis unu el ili ĝuste tie, kie David batis Goljaton, kaj ŝi tuj mor-



tigis lin. Liaj akompanantoj estis tiel timigitaj pro lia falo, ke ili ĉiuj iris returne kaj lasis la edzinon de Urio daŭrigi sian vojaĝon. Ŝi prenis kun si, kiel mi devus informi vin antaŭe, sian plej amatan filon el tiu kuniĝo; al li ŝi testamentis la ŝtonĵetilon, kaj tiel ĝi seninterrompe iris de patro al filo, ĝis kiam ĝi venis en mian posedon. Unu el ĝiaj posedintoj, mia prapra-pra-avo, kiu vivis antaŭ ducent kvindek jaroj, vizitis Anglujon kaj amikigis kun granda poeto, kiu estis terura ŝtelisto de cervoj; lia nomo, mi pensas, estis Shakespeare. Li ofte prunteprenis tiun ŝtonĵetilon kaj mortigis per ĝi tiel multajn el la cervoj de Sir Thomas Lucy, ke preskaŭ trafis lin la sorto de miaj du amikoj en Gibraltaro. La kompatinda Shakespeare estis malliberigita, kaj mia antaŭulo havigis al li lian liberigon en tre stranga maniero.

La reĝino Elizabeto tiam estis sur la trono, sed ŝi fariĝis jam tiel malagema, ke ĉia, eĉ bagatela afero ĝenis ŝin; vestiĝi, senvestiĝi, manĝi, trinki kaj fari aliajn aferojn, kiuj restu ne nomataj, faris la vivon por ŝi neportebla ŝarĝo. Mia praulo ebligis al ŝi, ke laŭ sia volo ŝi povis aŭ fariĝi tiujn aferojn per anstataŭanto aŭ tute ne fari ilin! Kaj kio, laŭ via supozo, es-




tis la sola rekompenco, kiun ŝi sukcesis trudi al li por la servo? La liberigon de Shakespeare! Li havis tian amon por tiu fama verkisto, ke li estus mallongiginta sian propran vivon por aldoni kelkajn tagojn al la vivo de sia amiko.

Mi ne aŭdis, ke iuj el la regatoj de la reĝino, kaj precipe ne la bovaĵ-manĝantoj, kiel oni vulgare nomas certan korpuson da gvardianoj, tre aprobis ŝian manieron de vivado tute sen manĝaĵo, kiom ajn la noveco de la afero eble imponis al ili en tiu tempo. Ŝi mem ne laŭvivis la kutimon pli ol sep jarojn kaj duonon.

Mia patro, kiu estis la lasta posedanto de tiu ŝtonĵetilo antaŭ mi, rakontis al mi la sekvantan anekdoton :

Li promenis sur la marbordo en Harwich, havante ĉi tiun ĵetilon en sia poŝo; antaŭ ol liaj paŝoj kovris unu mejlon, lin atakis furioza besto, nomata marĉevalo; kun malfermita bu-



ŝo ĝi kuris al li kun granda furiozeco; li hezitis momenton, sed tuj poste elpoŝigis la ĵetilon, retiris sin proksimume tricent futojn, klinis sin por preni du ŝtonetojn, de kiuj multaj kuŝis sub liaj piedoj, kaj ekĵetis ilin tiel lerte al la besto, ke ĉiu ŝtono elbatis unu okulon kaj lokiĝis en la kavo kaŭzita de la el-

bato. Li nun sidigis sin sur la dorso de la besto, kaj rajdis sur ĝi en la maron; ĉar en la momento, kiam ĝi perdis sian vidpovon, ĝi ankaŭ perdis sian furiozecon kaj fariĝis tute malsovaĝa. La ĵetilo estis metita en ĝian buŝon kiel bridilo, kaj la besto estis direktata kun plej granda facileco trans la oceanon. Post malpli ol tri horoj ili ambaŭ atingis la kontraŭan marbordon, kiu estas en distanco de ĉirkaŭ tridek marmejloj. La mastro de la gastejo "Tri Tasoĵ" en Hellevoetsluis en Holando aĉetis tiun marĉevalon, por elmontri ĝin, por sepcent dukatoj, kio egalas pli ol tricent pundojn, kaj en la sekvanta tago mia patro pagis por sia revojaĝo al Harwich.

Mia patro faris dum sia vojaĝo sur la dorso de la besto kelkajn strangajn observojn, kiujn mi rakontos poste.

Ĉapitro XII

Petolado; ĝiaj konsekvencoj — La kastelo de Windsor — "Sankta Paŭlo — Kolegio de kuracistoj — Funebro-partoprenantoj, tombofosistoj k. t. p. preskaŭ ruinigitaj. — La industrio de la apotekistoj.

Tiu fama ŝtonĵetilo ebligas al sia posedanto ĉiun taskon, kiun li deziras plenumi. Mi faris balonon de tiel ampleksaj dimensioj, ke ĝusta raporto pri la silko, kiun ĝi enhavis, estus ekster kredebleco. La magazeno de ĉiu silkaĵisto kaj la provizaĵo de ĉiu silkoteksisto en Londono, Westminster kaj Spitalfields kontribuis al ĝi. Per ĉi tiu balono kaj mia ĵetilo mi faris multajn petolaĵojn. Ekzemple, mi prenis unu domon de ĝia loko kaj anstataŭigis ĝin per alia, ne maltrankviligante la loĝantojn, kiuj kutime estis dormantaj aŭ tro multe okupitaj, por rimarki la movadon de sia loĝejo. Kiam la gardostaranto en la kastelo de Windsor aŭdis la horloĝon de Sankta Paŭlo batanta la dektrian horon, tio estis pro mia lerteco: en tiu nokto mi preskaŭ kunigis la konstruaĵojn, metante la kastelon sur la kampo de Sankta Georgo kaj portante ĝin returne antaŭ la tagiĝo, ne vekante iun el la loĝantoj. Malgraŭ tiuj heroaĵoj mi estus kaŝinta la sekreton de mia balono kaj ĝiaj ecoj, se Montgolfier ne estus farinta la arton de flugado publike konata.

La tridekan de septembro, kiam la Kolegio de kuracistoj

elektis siajn oficistojn kaj manĝis luksege kune, mi plenigis mian balonon, flugigis ĝin super la kupolon de ilia konstruaĵo, fiksitis la ĵetilon ĉirkaŭ la oran globon sur la supraĵo, alligis ĝian alian finon al la balono, kaj tuj suprenigis kun la kolegio ĝis granda alteco, kie mi tenis ilin pli ol tri monatojn. Vi kompreneble demandos, kion ili faris rilate la nutradon dum tiel longa tempo? Al ĉi tio mi respondas, ke eĉ se mi estus tentanta ilin pendantaj duoble pli longan tempon, ili ne estus suferintaj de tio maloportunecon, ĉar sufiĉege, aŭ pli bone abundege, ili kovris sian tablon por la ĉiutaga festeno.

Kvankam tio estis nur sendanĝera petolaĵo, ĝi tamen alportis multan malbonon al kelkaj respektindaj personoj inter la pastroj, funebraĵistoj, sakristianoj kaj tombo-fosistoj. Ili suferis, tion oni devas konfesi; ĉar estas bone konata fakto, ke dum la tri monatoj, kiam la kolegio pendis en la aero, kaj tiel la kuracistoj ne povis viziti siajn pacientojn, mortis neniu krom kelkaj homoj, kiuj falis antaŭ la falĉilo de la Tempo, kaj kelkaj mizeruloj, kiuj, eble por eviti iun bagatelan maloportunaĵon ĉi tie, metis sur sin perfortan manon kaj enprofundiĝis en mizero senfine pli granda ol tiu, kiun ili, sen momenta konsidero, esperis eviti per tia senpripensa paŝo.

Se la apotekistoj ne estus estintaj tre agemaj dum tiu tempo, duono de la funebraĵistoj estus bankrotintaj.

Ĉapitro XIII

Vojaĝo al la Nordo

La barono enŝipigas kun kapitano Phipps, atakas du grandajn ursojn kaj preskaŭ perdas sian vivon.

— Li havigas al si la konfidon de tiuj bestoj kaj tiam detruas milojn de ili — ŝarĝas la ŝipon kun ties femuroj kaj feloj — fordonacas la femurojn kaj ricevas rekompence ĝeneralan inviton al ĉiuj urbestraj festenoj. La barono rifuzas la honoron de trono kaj reĝinon kun ĝi. — Disputo inter la kapitano kaj la barono, en kiu, pro ĝentileco, la kapitano gajnas la punktojn.

Ni ĉiuj, memoras la lastan esplorvojaĝon de kapitano Phipps (nun lordo Mulgrave) al la nordo. Mi akompanis la kapitanon, ne kiel oficiro, sed kiel privata amiko. Kiam ni alvenis al alta norda latitudo, mi rigardis la objektojn ĉirkaŭ mi tra la teleskopo, kiun mi prezentis al via atento en miaj Gibraltaraĵoj. Mi pensis, ke mi vidas du grandajn blankajn ursojn en furioza aktiveco sur amaso da glacio, multe pli alta ol la mastoj, kaj en distanco de ĉirkaŭ unu mejlo kaj



duono. Mi tuj prenis mian karabenon, ĵetis ĝin sur miajn ŝultrojn kaj iris supren sur la glacio. Kiam mi atingis la supraĵon, la malebeneco de la supraĵo igis mian aliron al tiuj bestoj ne esprimeble peniga kaj danĝera; iufoje malhelpis min malbelegaj kavaĵoj, kiujn mi devis transsalti; en alia parto la supraĵo



estis tiel glata kiel spegulo kaj mi konstante falis; alproksimiĝante sufiĉe por atingi la ursojn, mi trovis, ke ili nur ludas. Mi tuj komencis taksi la valoron de iliaj feloj, ĉar ĉiu el ili estis tiel granda kiel bone nutrita bovo. Malfeliĉe en la sama momento, kiam mi direktis mian karabenon, mia dekstra piedo glitis, mi falis sur mian dorson, kaj la forto de la bato tute senkonsciigis min por preskaŭ duonhora. Tamen, kiam mi rekonsciigis (imagi mian surprizon!) mi trovis, ke unu el tiuj grandaj bestoj, kiujn mi ĵus priskribis, jam turnis min tiel, ke mia vizaĝo estis malsupre, kaj ĵus prenis la zonon de mia pantalono, kiu tiam estis nova kaj farita el led. Ĝi certe volis porti min, kun la piedoj antaŭe, Dio scias kien, kiam mi prenis ĉi tiun tranĉilon (montras grandan tranĉilon) el mia flanko poŝo, ekhakis ĉe unu el ĝiaj malantaŭaj piedoj kaj detranĉis tri el ĝiaj piedfingroj; ĝi tuj lasis min fali kaj blekis tre terure. Mi prenis mian karabenon kaj pafis al ĝi, dum ĝi forkuris; ĝi tuj falis. La bruo de la pafilo vekis kelkajn milojn da blankaj ursoj, kiuj estis dormantaj sur la glacio en distanco de duonmejlo; ili tuj venis al la loko. Mi ne povis perdi tempon. Plej feliĉa penso venis en mian cerbon ĝuste en tiu momento. Mi deprenis la felon kaj la kapon de la mortinta urso en duono de la tempo, kiun bezonus aliaj homoj por senfeligi kuniklon, kaj mi envolis min en ĝi, metante mian propran kapon sub la kapon de Bruin¹. La tuta aro tuj ĉirkaŭis min, kaj mia antaŭtimo ĵetis min, vi povas esti certaj, en plej kompatindan situacion; mia plano tamen sukcesis plej admirinde por mia savo. Ili ĉiuj alvenis flarante kaj verŝajne konsideris min urso-frato; mankis al mi nur la grandeco, por fari min bonega imitaĵo; tamen mi vidis inter ili kelkajn ursidojn, ne pli

1 Bruin = angla nomo por urso.

grandajn ol mi mem. Post kiam ili ĉiuj flaris min kaj la korpon de sia mortinta kunulo, kies felo nun fariĝis mia ŝirmaĵo, ni ŝajnis tre amikemaj, kaj mi trovis, ke mi povas imiti ĉiujn iliajn agojn sufiĉe bone; sed en murmurado, blekado, kaj ĉirkaŭpremado ili facile superis min. Mi nun komencis pensi, kiel mi povus profiti la komunan konfidon, kiun mi kreis inter mi kaj tiuj bestoj.

Mi aŭdis de maljuna armea ĥirurgisto, ke vundo en la spino kaŭzas tujan morton. Mi nun decidis provi tiun eksperimenton, kaj denove mi prenis mian tranĉilon. Per ĝi mi trafis la plej grandan urson en la nuko, apud la ŝultroj, sed kun granda antaŭtimo, ne dubante, ke la besto, se ĝi postvivos la pikon, disŝiros min. Tamen mi estis pli ol ordinare bonŝanca; ĝi falis malviva ĉe miaj piedoj, ne farante eĉ ia plej malgrandan bruon. Mi nun decidis mortigi ilin ĉiujn en tiu sama maniero, kaj tion mi efektive plenumis eĉ sen la plej malgranda malfacilaĵo; ĉar kvankam ili vidis siajn kunulojn fali, ili ne havis suspekton pri la kaŭzo, nek pri la efiko. Kiam ĉiuj kuŝis malvivaj antaŭ mi, mi sentis min dua Simsono mortiginta miajn milojn. Mi mallongigas la rakonton: mi revenis al la ŝipo kaj elpetis tri kvaronojn de la ŝipanaro por helpi min ĉe la senfeligado kaj por porti la femurojn sur la ŝipon; tion ni faris dum kelkaj horoj kaj plenŝarĝis la ŝipon per ili. La ceterajn partojn de la bestoj oni ĵetis en la maron, kaj tamen mi ne dubas, ke la cetero estus same bongusta kiel la femuro, se oni ĝin bone peklus.

Tuj post mia reveno mi sendis kelkajn femurojn, en la nomo de la kapitano, al la Lordoj de la Admiralitato, aliajn al la Lordoj de la Fisko, kelkajn al la Lordurbestro kaj Magistrato de Londono, kelkajn al ĉiuj negockompanioj kaj la restin-



tajn al miaj elektitaj amikoj, de kiuj mi ricevis varmajn dankojn, sed de la urbo Londono mi ricevis apartan honoron, t. e. invito manĝi en la Guildhall¹ ĉiujare en la urbestra tago.

1 urbodomo de Londono, kie ĉiujare la nove elektita urbestro okazigas imponan festenon, al kiu li invitas ĉiujn famulojn en la lando.

La ursofelojn mi sendis al la imperiestrino de Rusujo kiel vintrajn peltojn por sia imperiestrino moŝton kaj ŝian korteganaron. Pro tio ŝi skribis al mi dankleteron per sia propra mano kaj sendis ĝin per ambasadoro eksterordinara, invitante min partopreni la honorojn de sia lito kaj sia krono; sed ĉar mi neniam estis ambicia al reĝa digno, mi malakceptis en la plej ĝentila maniero la favoron de ŝia imperiestrina moŝto. La sama ambasadoro havis ordonon atendi kaj porti persone mian respondon al ŝia imperiestrina moŝto, por kio li forestis proksimume tri monatojn. La respondo de ŝia imperiestrina moŝto konvinkis min pri la forteco de ŝiaj amikaj sentoj kaj pri la digneco de ŝia menso: ŝia antaŭnelonga malsano estis entute (kiel ŝi mem — afabla kreitaĵo! — sin esprimis en konversacio kun princo Dolgoruki) rezulto de mia krueleco.

Kion la alia sekso vidas en mi, mi ne povas kompreni, sed la imperiestrino ne estas la sola regnestrino, kiu proponis al mi sian manon.

Kelkaj personoj tre maljuste raportis, ke dum tiu ekspedicio kapitano Phipps ne iris tiel malproksimen, kiel li estus povinta. Ĉi tie fariĝas mia devo, senkulpigi lin. Nia ŝipo estis en plej bona stato, ĝis kiam mi superŝargis ĝin per tia granda kvanto da ursofeloj kaj femuroj; post tio estus ja freneze provi daŭrigi la vojaĝon, ĉar ni nun apenaŭ kapablis batali kontraŭ vigla ventego, ne parolante pri tiuj montegoj da glacio, kiuj kuŝis en la pli altaj latitudoj.

La kapitano post tiu tempo ofte esprimis ĉagrenon pro tio, ke li ne partoprenis en la honoroj de tiu tago, kiun li emfaze nomis Ursofela tago. Li ankaŭ tre deziris scii, per kia arto mi sukcesis pereigi tiom da miloj sen laciĝo kaj sen danĝero por mi mem; efektive li tiel ambicias dividi kun mi la honoron, ke

mi eĉ kverelis pri tio, kaj nun ni ne parolas unu kun la alia. Li kuraĝe asertas, ke mi ne havis iun meriton, trompinte la ursojn, ĉar mi estis kovrita per unu el iliaj feloj; li eĉ deklaras, ke laŭ lia opinio ne ekzistas en Eŭropo inter la homa speco tiel perfekta natura urso, kiel li mem estas.

Li nun estas nobela lordo, kaj mi havas tiel ĝentilajn moĝojn, ke mi ne volas disputi kun lia lorda moŝto pri punkto tiel delikata.

Ĉapitro XIV


Nia barono superas baronon Tott super ĉiu komparo, tamen ne sukcesas en parto de lia provo. — Li falas en malfavoron ĉe la Grandsinjoro, kiu ordonas la detranĉon de lia kapo. — Li forkuras kaj enŝipigas, estas portata al Venecio.

Barono de Tott en siaj memuaroj faras paradon tiel grandan pri unu sola ago, kiel multaj vojaĝantoj, kies tuta vivo pasis en rigardado al la diversaj partoj de la tergloblo; mi-aflanke, se mi estus elblovita el Europo ĝis Azio el la faŭko de kanono, mi poste fanfaronus pri ĝi malpli, ol li fanfaronas pro tio, ke li pafis per turka kanono. Tio, kion li diras pri tiu mirinda kanono, laŭ mia memoro estas jeno:

”La turkoj lokis sub la kastelo kaj proksime de la urbo grandegan kanonon, fanditan el kupro, kiu portis marmoran kuglon de milcentfunta pezo. Mi volis — diras Tott — pafi ĝin, sed mi volis unue prijuĝi ĝian efikon. La homamaso ĉir-



kaŭ mi tremis ĉe ĉi tiu propono, asertante, ke ĝi detruos ne sole la kastelon, sed ankaŭ la urbon; fine iliaj, timoj parte ĉesis, kaj oni permesis al mi pafi per ĝi. Ĝi bezonis ne malpli ol tricent tridek funtojn da pulvo, kaj la kuglo pezis, kiel mi jam diris, mil cent funtojn. Kiam la inĝeniero alportis la tuŝ-pulvon, la amaso ĉirkaŭ mi retirigis kiel eble plej rapide; kun plej granda malfacilaĵo mi konvinkis la paŝaon, kiu intence venis, ke ne estas danĝere: eĉ la inĝeniero, kiu devis pafi laŭ



miaj instrukcioj, forte timis. Mi starigis min sur ŝtonaĵo malantaŭ la kanono, donis la signalon kaj sentis ekpuŝon similan al skuo de tertremo! En distanco de tricent klaftoj la kuglo eksplodis en tri pecojn; la fragmentoj transflugis la markolon, resaltis de la kontraŭa monto kaj postlasis la supraĵon de la akvo en sia tuta larĝeco kiel grandan ŝaŭmaĵon.”

Jen, sinjoroj, kiom mi povas memori, la rakonto de barono Tott pri la plej granda kanono en la konata mondo. Kaj

kiam mi estis tie antaŭ nelonge, la anekdoto pri la Totta pafado el tiu grandega kanono estis menciata kiel pruvo de la eksterordinara kuraĝo de tiu sinjoro.

Mi decidis, ke franco ne superu min; tial mi prenis sur mian ŝultron tiun saman kanonon, kaj ekvilibriginte ĝin en bona pozicio, saltis kun ĝi en la maron, naĝis ĝis la kontraŭa bordo, kaj de tie malfeliĉe provis reĵeti ĝin sur ĝian antaŭan lokon. Mi diras "malfeliĉe", ĉar ĝi iom glitis en mia mano, ĝuste kiam mi volis ĵeti ĝin, kaj sekve de tio ĝi falis en la mezon de la kanalo, kie ĝi nun kuŝas, sen kredebleco, ke oni iam ĝin reprenos. Malgraŭ la granda favoro, kiun mi havis ĉe la grandsinjoro, kiel mi jam diris, ĉi tiu kruela turko, kiam li aŭdis pri la perdo de sia fama kanono, ordonis, ke oni dehaku mian kapon. Mi tuj informigis pri tio de unu el la sultanoj, ĉe kiu mi fariĝis granda favorato, kaj ŝi kaŝis min en sia buduaro, dum la oficiro kun siaj asistantoj, kiuj estis komisiitaj min ekzekuti, serĉis min.

En tiu sama nokto mi forsaviĝis sur ŝipo veturanta al Venecio; ĉe tiu ŝipo oni ĝuste tiam levis la ankron por la vojaĝo.

Ĉi tiun lastan historion, sinjoroj, mi ne tre ŝatas rakonti, ĉar mi malsukcesis en mia entrepreno, kaj krom tio mi preskaŭ perdis mian vivon; tamen, ĉar ĝi enhavas nenion kontraŭ mia honoro, mi ne volis kaŝi ĝin antaŭ vi.


Ĉapitro XV

Kroma rakonto pri la vojaĝo inter Harwich kaj Hellevoitsluis. — Priskribo de multaj submaraj objektoj neniam menciitaj de iu alia vojaĝanto antaŭe. Rokoj vidataj sur tiu vojaĝo egalas la Alpoj laŭ alteco. — Omaroj, kankroj ktp. de eksterordinara grandeco. — La barono savas vivon de virino. — La kaŭzo, kial ŝi falis en la maron. — Li plenumas kun sukceso la direktivojn de Doktoro Hawes.

Mi forlasis kelkajn tre gravajn partojn de la rakonto pri la vojaĝo de mia patro trans la Anglan markolon al Holando; tiujn partojn, por ke ili ne estu tute perditaj, mi nun fidele donos al vi per liaj propraj vortoj, kiel mi aŭdis lin rakonti ilin al siaj amikoj kelkajn fojojn.

”Ĉe mia alveno en Hellevoitsluis,” — diris mia patro, ”oni rimarkis, ke mi spiras malfacile; kiam la loĝantoj demandis pri la kaŭzo, mi informis ilin, ke la besto, sur kies dorso mi rajdis de Harwich al ilia bordo, ne povis naĝi! La stranga formo kaj la karakterizeco de tiu besto estas tiaj, ke ĝi ne povas drivi aŭ sin movi sur la supraĵo de la akvo; ĝi kuris per nek-redebla rapideco. Sur la fundo, de marbordo al marbordo, pelante antaŭ si milionojn da fiŝoj, multaj el ili estis tute mal-similaj al ĉiuj, kiujn mi antaŭe vidis, ĉar ili portis sian kapon

sur la ekstremaĵo de sia vosto. Mi transiris,” — li daŭrigis, — ”unu mirindegan vicon da rokoj, same altaj kiel la Alpoj (la pintoj aŭ plej altaj partoj de tiuj submaraj montoj estas laŭdire pli ol cent klaftojn sub la supraĵo de la maro), sur kies deklivoj kreskis multaj specoj de altaj arboj, ŝarĝitaj per marfruktoj, ekzemple per omaroj, kankroj, ostroj, petunkoj, mituloj, marlimakoj ktp.; kelkaj el ili unuope sufiĉis por veturilŝargo, kaj certe neniu estis malpli granda ol portista ŝargo! Tiuj, kiujn oni vendas en niaj foirejoj, estas el malsupera pigmea speco, aŭ, pli bone dirite, akvofalaĵoj, t. e. fruktoj, deskuitaj per la moviĝo de la akvo de sur la arbobranĉoj, sur kiuj ili kreskis, simile kiel la fruktoj! en niaj ĝardenoj estas dearbigataj de la vento! La omararboj ŝajnis al mi la plej fruktoricaĵ, sed la kankro- kaj ostroarboj estis la plej altaj. La marlimakoj kreskas sur speco de arbustoj, kiu staras ĉe la piedo de la ostrarboj kaj supren volvigas ĉirkaŭ ĝi kiel la hedero ĉirkaŭ la kverko. Mi rimarkis ankaŭ la rezulton de kelkaj ŝiprompiĝoj ktp., precipe ĉe unu ŝipo, kiu surfundiĝis kaŭze de kunpuŝiĝo kun monto aŭ roko, kies supraĵo estis nur tri klaftojn sub la supraĵo. Subakviĝante ĝi falis sur sian flankon kaj elradikigis tre grandan omararbon. Tio okazis en printempo, kiam la omaroj estis tre junaj, kaj multaj el ili, deskuitaj per la forteco de la ekpuŝo, falis sur kankroarbon, kiu kreskis sub ili. La omaroj kaj kankroj kuniĝis kaj produktis novan frukton aspektantan kiel ambaŭ kune. Mi provis kunporti ekzempleron, sed ĝi estis tro granda, kaj mia salakva Pegaso ŝajnis tre malkontenta pri ĉiu provo haltigi ĝian kuradon, dum mi restis sur ĝia dorso. Krom tio mi tiam estis, kvankam galopanta sur roka monto kuŝanta ĉirkaŭ mezvoje de la vojaĝo, minimume kvincent klaftojn sub la supraĵo de la maro, kaj mi komencis



trovi la mankon de aero maloportuna; tial mi ne havis la in-
klinon plilongigi la tempon. Krom tio mia situacio en aliaj
rilatoj estis tre malagrabla; mi renkontis multajn grandajn
fiŝojn, kiuj, se mi povis juĝi laŭ iliaj malfermitaj buŝoj, ne nur
kapablis, sed ankaŭ deziris manĝi nin; kaj ĉar mia Rozinan-

to estis blinda, mi mem devis gardi nin kontraŭ la atencoj de tiuj estaĵoj kaj krome ne malatenti miajn aliajn malfacilaĵojn.

Alproksimiĝante al la holanda marbordo, kiam la akvo super niaj kapoj havis ne pli ol dudek klaftojn, mi opiniis vidi homan figuron en virina vestaĵo, kuŝantan sur la sablaro antaŭ ni kaj montrantan signon de vivo. Kiam mi venis pli proksimen, mi vidis, ke ŝia mano moviĝas; mi prenis ĝin en la mian kaj portis la korpon sur la bordon. Apotekisto, kiu ĵus ricevis instruon de d-ro Hawes en Londono, revivigis ŝin. Ŝi estis edzino de viro, kiu estris ŝipon el Hellevoitsluis. Kiam li ĵus forlasis la havenon, ŝi, aŭdinte ke li havis kun si amatinon, sekvis lin en remboato. Atinginte la ferdekon, ŝi rapidis al sia edzo kaj bategis lin kun tia furiozeco, ke li trovis plej prudente iri flanken kaj permesi al ŝi fari la impreson de siaj fingroj prefere sur la ondoj ol sur lia vizaĝo. Li ne malbone konjektis pri la rezulto; ĉar renkontante neniun baron, ŝi iris rekte en la maron, kaj estis mia malfeliĉa sorto meti la fundamenton de reunuiĝo por tiu feliĉa paro.

Mi facile povas imagi la malbenojn, per kiuj la edzo ŝarĝis min, kiam ĉe lia reveno tiu dolĉa kreitaĵo atendis lin kaj kiam li eksciis la manieron, en kiu ŝi denove venis en la mondon.

Kvankam granda estis la aflikto, kiun mi kreis por ĉi tiu kompatinda diablo, tamen mi esperas, ke li mortos en amikeco al mi, ĉar mia motivo estis bona, kvankam la sekvoj por li, oni devas tion konfesi, estis teruraj.

Ĉapitro XVI

Ĉi tiu estas tre mallonga ĉapitro, sed ĝi enhavas fakton, pro kiu la memoro pri la barono devas resti kara al ĉiu anglo, precipe al tiu, kiu eble havos la malfeliĉon fariĝi militkaptito.

Ĉe mia reveno de Gibraltaro mi vojaĝis al Anglujo tra Franclando. Kvankam mi estas alilandano, la vojaĝo ne kaŭzis al mi iun malfacilaĵon. Mi trovis en la haveno de Calais ŝipon ĵus alvenintan kun nombro da anglaj maristoj kiel militkaptitoj. Mi tuj elpensis la ideon doni al tiuj bravuloj liberecon, kaj tion mi plenumis jene :

Farinte paron da grandaj flugiloj, longaj po cent dudek futoj kaj larĝaj po kvardek du, kaj alfiksinte ilin al mi mem, mi leviĝis je tagiĝo, kiam ĉiuj dormis, eĉ la gardostaranto sur la ferdeko. Ŝvebante super la ŝipo, mi alligis tri hokegojn al la topoj de la tri mastoj per mia ĵetilo kaj levis la ŝipon kelkajn futojn el la akvo kaj tuj poste ekflugis trans la markolon al Dover, kie mi alvenis post duonhoro! Ne plu bezonante tiujn flugilojn, mi donacis ilin al la guberniestro de la kastelo de Dover, kie ili nun estas ekspoziciataj por la scivolemuloj.

La kaptitoj kaj la francoj, kiuj gardis ilin, ne vekiĝis, ĝis kiam ili jam estis du horojn sur la Dovera enŝipiĝejo. Kiam la angloj komprenis sian situacion, ili tuj interŝanĝis lokojn kun la gardistoj kaj reprenis tion, kion oni forrabis de ili, sed ne-

nion plian, ĉar ili estis tro grandanimaj por reciproki en rabado.

Ĉapitro XVII

Vojaĝo orienten. La barono prezentas amikon, kiu neniam trompis lin. — Li gajnas cent gineojn, fidante al la nazo de tiu amiko. — Ĉasado surmare. — Aliaj cirkonstancoj, kiuj espereble kaŭzos al la leganto ne malgrandan plezuron.

Dum vojaĝo, kiun mi faris al Orienta Hindujo kun kapitano Hamilton, mi havis ĉe mi plej amatan ĉashundon; ĝi valoris, por uzi konatan frazon, sian pezon en oro, ĉar ĝi neniam min trompis. Iun tagon, kiam ni estis, laŭ la plej bona observado, kiun ni povis fari, en distanco de minimume tricent mejloj de tero, mia hundo subite ekflaris; mi observis ĝin proksimume unu horon kun mirego kaj menciis la cirkonstancon al la ŝipestro kaj al ĉiuj oficiroj sur la ŝipo, asertante, ke ni nepre estas proksime de tero, ĉar mia hundo flaris ĉasaĵon. Pri tio ĉiuj ridis; sed tio ne ŝanĝis eĉ iomete la bonan opinion, kiun mi havis pri mia hundo. Post longa disputo por kaj kontraŭ mi sentime diris al la ŝipestro, ke mi fidas la nazon de mia hundo pli multe ol ĉiujn okulojn de la ŝipanaro, kaj tial mi proponis veti la sumon, kiun mi kontraktis pagi por mia vojaĝo (t. e. cent gineojn), ke ni trovos ĉasaĵon post malpli ol duonhoro. La ŝipestro (bona bravulo) ridis denove, petis sinjoron Crawford, la kuraciston, ke li palpu mian pulson; li faris tion kaj raportis, ke mi estas perfekte sana. La sekvanta

dialogo okazis inter ili; mi aŭdis ĝin, kvankam ĝi estis parolata mallaŭte kaj en kelka distanco.


Ŝipestro: Lia cerbo estas en malordo; mi ne povas kun honoro akcepti lian veton.

Kuracisto: Mi opinias male; li estas tute sana kaj pli multe kredas al la flarkapablo de sia hundo ol al la opinio de ĉiuj oficiroj sur la ŝipo; li certe malgajnos, kaj tion li ja meritas.

Ŝipestro: Tia veto ne povas esti justa de mia flanko; tamen mi akceptos ĝin, eĉ se mi redonos lian monon poste.

Dum ĉi tiu interparolo la hundo daŭrigis sian flaradon kaj konfirmis al mi pli multe mian antaŭan opinion. Mi proponis la veton duan fojon, ĝi tiam estis akceptita. "Farite!" ape-naŭ estis eldirita ĉe ambaŭ flankoj, kiam kelkaj maristoj, kiuj fiŝkaptis en la longa boato, alligita al la posta parto de la ŝipo, harpunis tre grandan ŝarkon, kiun ili surŝipigis. Tuj ili komencis distranĉi ĝin, por enbareligi la oleon, kaj jen — ili trovis ne malpli ol ses parojn da vivantaj perdrikoj en la stomako de ĉi tiu besto.

Ili estis en tiu situacio jam tiel longe, ke unu el la perdrikinoj estis sidanta sur kvar ovojn, kaj kvina ĵus elkoviĝis, kiam la ŝarko estis malfermata. Ĉi tiun junan birdon mi edukis, metante ĝin al katidaro, kiu venis en la mondon kelkajn mi-



nutojn antaŭe! La maljuna katino amis ĝin tiel kiel iun el siaj propraj idoj kvarpiedaj, kaj kiam la birdido forflugis tiel malproksimen, ke la katino ne povis atingi ĝin, la katino estis tre malgaja ĝis ĝia reveno. Inter la aliaj perdrikoj estis kvar inoj; unu aŭ alia ĉiam estis sidanta sur ovoj dum la vojaĝo, kaj tiel ni havis sufiĉon da ĉasaĵo por la tablo de la ŝipestro. Al la brava hundo, (ĉar ĝi estis la kaŭzo de mia gajno de cent gineoj) pro dankemo mi donis la ostojn ĉiutage kaj kelkafoje eĉ tutan birdon.

Ĉapitro XVIII

Dua vojaĝo al la luno

Dua vizito (sed akcidenta) al la luno. — La ŝipo pelata per uragano mil kilometrojn super la supraĵo de la akvo. — Nova atmosfero renkontas ilin kaj portas ilin en vastegan havenon sur la luno. — Priskribo pri la loĝantoj kaj ilia eniro en la lunan mondon. Bestoj, kutimoj, bataliloj, milito, vino, vegetaĵoj ktp.

Mi jam informis vin pri vojaĝo, kiun mi faris al la luno, por serĉi mian arĝentan hakilon; mi poste faris alian vojaĝon en multe pli agrabla maniero kaj restis sur la luno sufiĉe longan tempon por noti kelkajn aferojn, kiujn mi provos priskribi tiel precize, kiel mia memoro al mi permesos.


Mi partoprenis esplorvojaĝon laŭ peto de malproksima parenco, kiu havis la strangan ideon, ke oni povas trovi homojn, kiuj estas same grandaj kiel tiuj priskribitaj de Gulliver en la imperio de Brobdignag. Mi ĉiam konsideris tiun rakonton kiel fabelon; tamen, por plaĉi al li, ĉar li faris min sia heredonto, mi akompanis lin. Ni ŝipveturis al la sudaj maroj, kien ni venis, sen vidi ion rimarkindan krom kelkaj flugantaj viroj kaj virinoj, kiuj ludis "saltantan ranon" kaj dancis menueton en la aero.

En la dekoka tago, post kiam ni preterpasis la insulon




Otaheite, kiun kapitano Cook menciis kiel la lokon, de kie li alportis Omai, uragano alten blovis la ŝipon minimume mil kilometrojn de sur la supraĵo de la maro kaj, tenis ĝin en tiu alteco, ĝis kiam freŝa ventego leviĝis kaj plenigis la velojn en ĉiuj partoj, kaj nun ni vojaĝis antaŭen kun terura rapideco;

tiel ni veturis super la nuboj dum ses semajnoj. Fine ni trovis grandan landon sur la ĉielo, similan al ronda kaj brileganta insulo, kie ni, atinginte oportunan havenon, surbordiĝis kaj tuj trovis, ke ĝi estas loĝata. Malsupre de ni ni vidis alian teron kun urboj, arboj, montoj, riveroj, maroj, ktp., kiu laŭ nia konjekto estis la mondo, kiun ni forlasis.



Ĉi tie ni vidis grandegajn figurojn rajdantajn sur mirinde grandegaj vulturoj, el kiuj ĉiu havis tri kapojn. Por havigi al vi ideon pri la grandeco de tiuj birdoj, mi devas informi vin, ke ĉiu el iliaj flugiloj havis la larĝecon kaj la sesoblan longecon de la ĉefa velo de nia ŝipo proksimume sescent-tuna. Anstataŭ rajdi sur ĉevaloj, kiel ni faras en ĉi tiu mondo, la loĝantoj de la luno (ĉar ni nun trovis, ke la insulo estas la luno) ĉirkaŭflugas sur tiuj birdoj.

La reĝo ĝuste estis okupita per milito kontraŭ la suno, kaj li proponis al mi oficiran komision; sed mi rifuzis la honoron, kiun lia reĝa moŝto intencis doni al mi.



Ĉio en tiu mondo havas eksterordinaran amplekson! Ordinara pulo ne estas multe pli malgranda ol unu el niaj ŝafoj. En milito la ĉefaj bataliloj estas rafanoj, kiujn oni uzas kiel sagojn; ĉiu, kiu estas vundita per tia sago, tuj mortas. La ŝildoj de la lunanoj estas faritaj el fungoj, kaj kiam rafanoj ne estas haveblaj pro ŝanĝo de la sezono, ili uzas tigojn de asparago.

Mi vidis tie ankaŭ kelkajn indiĝenojn de la hundostelo; komerco logas ilin al vagado. Iliaj vizaĝoj similas tiujn de grandaj dogoj, la okuloj troviĝas proksime de la suba parto aŭ pinto de la nazo. Palpebrojn ili ne havas, sed ili kovras siajn okulojn dum dormo per la fino de sia lango; ili kutime havas la altecon de dudek futoj. Oni ne nomas ilin speco de homoj, sed kuirantaj bestoj, ĉar ili preparas sian manĝaĵon per fajro, kiel ni faras tion. Sed ili ne perdas tempon per manĝado; ili malfermas sian maldekstran flankon kaj metas la tutan kvanton da manĝaĵo en unu fojo en la stomakon; poste ili refermas la flankon ĝis la sama tago de la sekvanta monato. Ili re-

galas sin per manĝaĵo ne pli ofte ol dek du fojojn dum jaro, do unu fojon en monato.

Ĉiu krom manĝegulo aŭ Epikurano certe preferas ĉj tiun metodon al la nia.

Estas nur unu sekso inter la kuirantaj bestoj kaj ĉiuj aliaj bestoj sur la luno; ili ĉiuj estas produktoj de arboj diversgrandaj kaj diversfoliaj. Tiu arbo, kiu produktas kuirantan beston aŭ homan specon, estas multe pli bela ol ĉiuj aliaj arboj: ĝi havas grandajn rektajn branĉojn kaj karnokolorajn foliojn, kaj la fruktoj, kiujn ĝi produktas, estas nuksoj aŭ silikvoj, kovritaj de malmola ŝelo kaj longaj minimume du metrojn. Kiam ili maturiĝis, kio estas juĝata laŭ la ŝanĝita koloro, oni tre zorge kolektas kaj flankenmetas ilin por difinita tempo; kiam oni volas vivigi la semon de tiuj nuksoj, oni ĵetas ilin en grandan kaldronon da bolanta akvo, kiu malfermas la ŝelon post kelkaj horoj, kaj la kreitaĵo elsaltas.

La naturo formas ilian menson por diversaj okupoj antaŭ ilia alveno en la mondo: el unu ŝelo elvenas militisto, el alia



— filozofo, el tria — teologo, el kvara — leĝisto, el kvina — terkulturisto, el sesa — arlekono, ktp., kaj ĉiu el ili tuj komencas sin perfektigi, ekzercante praktike tion, kion li antaŭe sciis nur teorie ...

Kiam ili maljuniĝas, ili ne mortas, sed fariĝas aero kaj forvapiĝas kiel fumo! Trinkaĵon ili tute ne bezonas; la solaj eliraĵoj de sia korpo foriĝas senkonscie kaj pere de ilia spirado. Ili havas sur ĉiu mano nur unu fingron, per kiu ili faras ĉion en same perfekta maniero kiel ni, kiuj havas kvar fingrojn kaj polekson. Ilia kapo estas lokita sub la dekstra brako, kaj kiam ili estas ekveturontaj aŭ preparas sin por iu forta movlaboro, ili kutime lasas la kapon hejme, ĉar ili povas konsulti la kapon en kiu ajn distanco; ĉi tio estas tre ordinara kutimo; kaj se altranguloj aŭ eminentuloj inter la lunanoj havas inklinton vidi, kio okazas en la simpla popolo, ili restas hejme, sed sendas sole sian senkorpan kapon, kiu ĉeestas nerekonate kaj revenas laŭvole kun raporto pri la okazintaĵoj.

La kernoj de iliaj vinberoj ĝuste similas hajlerojn, kaj mi



estas plene konvinkilta, ke kiam ventego skuas iliajn vinberarojn kaj deĵetas la fruktojn de sur la branĉoj, la kernoj falias malsupren kaj formas nian hajlon. Mi konsilas al tiuj, kiuj same opinias, konservi kvanton de la hajleroj ĉe la plej proksima hajlado kaj fari lunan vinon. Ĝi estas populara trinkaĵo ĉe Sankta Luko.

Kelkajn rimarkindajn cirkonstancojn mi preskaŭ forgesis. Ili uzas sian ventron same, kiel ni uzas sakon, kaj ĵetas en ĝin ĉion laŭ bezono, ĉar ili povas fermi aŭ malfermi ĝin laŭvole, kiel ankaŭ la stomakon. Ili ne estas ĝenataj per internaĵoj, hepato, koro aŭ intestaro, nek embarasataj per vestoj, kaj neniu parto de ilia korpo estas maldeca por montrado. La okulojn ili povas elpreni el ilia loko kaj reenmeti, laŭvole, kaj ili povas vidi per ili same bone, se ili tenas ilin en la manoj, kiel en la kapo, kaj se per iu katastrofo ili perdas aŭ difektas okulon, ili povas aĉeti aŭ pruntepreni alian kaj vidi per ĝi tiel klare, kiel ili vidas per siaj propraj. Negocistoj kun okuloj estas tial tre multnombraj en plej multaj partoj de la luno, kaj en ĉi tiu sola punkto ĉiuj loĝantoj estas tre kapricaj: jen verdaj kaj jen flavaj okuloj estas laŭmodaj.

Mi scias, ke tiuj aferoj ŝajnas strangaj; sed se iu ombro de dubo restas en ies menso, mi ripetas: li mem vojaĝu tien, kaj tiam li ekscios, ke mi estas verema vojaĝanto.

Ĉapitro XIX

La barono transiras la riveron Tamizo sen helpo de ponto, ŝipo, boato, balono aŭ eĉ sia propra volo. Li vekigas post longa dormo kaj detruas monstron, kiu vivis per la detruo de aliaj.

Mia unua vizito al Anglujo estis ĉirkaŭ la komenco de la regado de la nuna reĝo. Mi havis la okazon iri al la haveno de Wapping por vidi komercaĵon enŝipigitan por kelkaj amikoj en Hamburg. Post tiu vizito mi pasis tra la Tur-haveno por iri returne. Ĉi tie mi trovis la sunon tiel potenca, kaj mi estis tiel laca, ke mi devis enpaŝi en unu el la kanonoj por refreŝigi min; tie mi profunde endormiĝils. Tio okazis ĉirkaŭ tagmezo; estis la kvara de junio, kaj ĝuste je la unua horo ĉi tiuj kanonoj estis pafataj memore de tiu datreveno¹. Ili ĉiuj estis ŝargitaj per eksplodaĵo tiun matenon, kaj ĉar neniu supozis min en tiu situacio, mi estis elpafita trans la domojn sur la kontraŭan bordon de la rivero, en korton de farmisto, inter Bermondsey kaj Deptford, kie mi falis sur grandan fojn-amason sen vekigi, kaj restis tie en profunda dormo ĝis la fojno fariĝis tiel terure altpreza (kio okazis proksimume tri monatojn poste), ke la farmisto trovis profitodone sendi sian tutan provizon al la foiro. La amaso, sur kiu mi ripozis, estis la plej granda en la korto kaj ĝi ampleksis pli ol kvincent

1 La naskiĝtago de la reĝo.



ŝarĝojn. Tiun oni komencis distranĉi unue. — Mi vekigis de la voĉo de la viroj, kiuj supreniris la ŝtupetaron por komenci ĉe la supraĵo, kaj mi leviĝis tute sen scio pri mia situacio; provante forkuri mi falis sur la farmiston, al kiu la fojno apartenis, kaj rompis lian nukon, tamen mem ricevis neniun di-

fekton. Mi poste trovis, je mia granda konsolo, ke tiu viro estis plej abomena fripono, kiu ĉiam retenis la produktaĵojn de sia bieno por la tempo, kiam la prezoj plialtiĝis.



Ĉapitro XX

La barono glitas tra la mondo; vizitinte la monton Etno, li troviĝas en la Suda maro. — Li vizitas Vulkanon dum sia vojaĝo; suriras holandan ŝipon; venas al insulo de fromaĝo, ĉirkaŭita de lakto-marĝo; priskribas eksterordinarajn objektojn. — Ili perdas la kompason; la ŝipo glitas en la buŝon de fiŝo nekonata en ĉi tiu parto de la mondo; ilia malfacilaĵo forsaviĝi de tie; alvenas en la Kaspian maron. — Malsatigas urson ĝismorte. — Kelkaj anekdotoj pri vesto. — En ĉi tiu ĉapitro, kiu estas la plej longa, la barono moralizas pri la virto de veremo.

La vojaĝo de sinjoro Sekostaro al Sicilio, pri kiu mi legis kun granda plezuro, instigis min fari viziton al la monto Etno; mia vojaĝo al tiu loko ne aperigis iun rakontindan cirkonstancon.

Iun matenon frue, tri aŭ kvar tagojn post mia alveno, mi eliris el dometo, en kiu mi dormis, en distanco de dek kilometroj de la malsupraĵo de la monto, decidinte esplori la internaĵon, se mi eĉ pereus dum la provo. Post tri horoj da malfacila laboro mi trovis min ĉe la supraĵo; ĝi tiam estis — kaj jam estis dum pli ol tri semajnoj — furiozanta; ĝia aspekto en tiu stato estas jam tiel ofte priskribita de diversaj vojaĝantoj,

ke mi ne tedos vin per priskribo de objektoj, kun kiuj vi jam bone konatiĝis.

Mi promenis ĉirkaŭ la rando de la kratero, kiu ŝajnis almenaŭ kvindekoble pli ampleksa ol la Diabla Punĉo-Pelvo apud Petersfield, ĉe la vojo al Portsmouth, sed ne tiel vasta en la fundo, ĉar en tiu parto ĝi pli similas la mallarĝan parton de funelo, ol punĉo-pelvon. Fine, decidinte, mi ensaltis kun la piedoj antaŭe; mi tuj trovis min en varma loko, kaj mia korpo estis kontuzata kaj bruligata en diversaj partoj de la ruĝe varmegaj cindroj, kiuj en furioza supreniro kontraŭis mian malsupreniron; tamen mia pezo baldaŭ portis min al la malsupraĵo, kie mi trovis min meze de bruado, miksitaj kun plej teruraj malbenadoj; rekonsciiĝinte kaj sentante malpliigon de miaj doloroj, mi komencis ĉirkaŭrigardi. Imagu, sinjoroj, mian surprizon, kiam mi trovis min en kunesto de Vulkano kaj liaj Ciklopoj, kiuj dum la lastaj tri semajnoj, menciitaj antaŭe, malpaciĝis pri konservado de bonordo kaj konvena disciplino, kaj tio kaŭzis tian alarmegon dum tiu tempo en la supra mondo. Tamen, mia alveno restarigis pacon en la tuta



societo kaj Vulkano mem honoris min, metante kataplasmon sur miajn vundojn, kiuj tuj saniĝis; li ankaŭ metis antaŭ min refreŝigaĵojn, precipe nektaron kaj aliajn freŝajn vinojn, al kiuj nur la dioj kaj diinoj mem aspiras.



Post la fino de tiu manĝo, Vulvano ordonis al Venuso, ke ŝi montru al mi ĉiun favoron, kiun mia situacio postulis. Priskribi la ĉambron kaj la kuŝejon, sur kiu mi ripozis, estas tulte ne eble, tial mi ne provos ĝin; sufiĉu diri, ke fari al tia priskribo justecon aŭ paroli pri tiu korafabla diino en iu maniero konforma al ŝia merito, estas ekster la kapablo de vortoj.

Vulkano donis al mi tre koncizan historion pri la monto Etno. Li diris, ke ĝi estas nenio alia krom amaso da cindraĵoj ĵetitaj el lia forĝejo; ke li ofte estas devigata puni siajn servistojn, al kiuj li en sia furiozo kutime ĵetas ruĝe varmegajn karbojn el sia hejmo, kiujn ili ofte kaptas kun granda lerteco kaj elĵetas eksteren en la mondon, por ke li ne povu atingi ilin, ĉar ili neniam eĉ provas ataki lin returne per reĵeto. "Niaj



kvereloj” — aldonis li — ”iufoje daŭras tri aŭ kvar monatojn, kaj tiuj aperaĵoj de karboj aŭ cindroj en la mondo estas tio, kion vi mortuloj nomas erupcioj.” Monto Vezuvo, li certigis al mi, estas alia el liaj fabrikoj, al kiu li havas koridoron mil sepcent kilometrojn sub la fundo de la maro, kie similaj kvereloj kaŭzas similajn erupciojn. Mi estus restinta tie kiel humila servanto de sinjorino Venuso, sed kelkaj klaĉistoj, kiuj havas ĝojon pri malico, murmuris en la orelojn de Vulkano rakonton, kiu levis en li konvulsion de ĵaluzo ne pacigebla.



Sen eĉ la plej malgranda antaŭaverto li prenis min iun matenon sub sian brakon, dum mi servis Venuson kiel kutime, kaj portis min en ĉambron, kiun mi neniam vidis antaŭe, en kiu estis, kiel ŝajnis, puto kun larĝa aperturo; super ĝi li tenis min en braklonga distanco, kaj dirante: "sendanka mortulo, reiru al la mondo, de kie vi venis" kaj ne donante al mi eĉ plej malgrandan eblecon respondi, li ĵetis min en la centron. Mi trovis min malsupreniranta kun pliĝanta rapideco, ĝis la teruro en mia menso forigis de mi ĉiun kapablon de pripenso. Mi supozas, ke mi falis en letargion, el kiu mi subite vekigis per enfalo en grandan kvanton da akvo, kiu estis lumigata per la sunaj radioj!!!

De la tempo de mia infaneco mi povis naĝi tre bone kaj fari ĉiujn artifikojn en la akvo. Mi nun trovis min en paradizo, kompare al la mensaj teruroj, el kiuj mi ĵus estis liberigita. Post ĉirkaŭrigardo dum ioma tempo, mi povis vidi nenion krom marspaco etendiĝanta en ĉiuj direktoj ĝis nevidebleco; mi ankaŭ trovis ĝin tre malvarma, tute malsimila klimato al tiu de la fabriko de Vulkano. Fine mi ekvidis en kelka distanco objekton mirinde grandan, similan al grandega roko, alproksimiĝantan al mi; mi tuj trovis, ke ĝi estas peco da drivanta glacio. Mi ĉirkaŭnaĝis ĝin, ĝis kiam mi trovis lokon, kie mi povis grimpi ĝis la supraĵo; tion mi faris, sed ne sen iom da malfacileco. Mi ankoraŭ ne povis vidi teron, kaj malespero revenis kun duobla potenco. Tamen, antaŭ noktiĝo mi vidis velon, al kiu mi naĝis tre rapide; kiam mi estis proksime, mi vokis germane; ili respondis holande. Mi tiam ĵetis min en la maron, kaj ili elĵetis ŝnuregon, per kiu oni prenis min sur la ŝipon. Mi nun demandis, kie mi estas, kaj ricevis informon, ke ni estas en la granda Suda oceano. Ĉi tiu sciigo forigis ĉiujn

dubojn kaj malfacilaĵojn. Nun evidentigis, ke mi trapasis de la monto Etno tra la centro de la tero ĝis la sudaj maroj. Ĉi tio, sinjoroj, estis pli mallonga vojo ol vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, kaj tion neniu krom mi iam faris aŭ eĉ provis fari; tamen la proksiman fojon, kiam mi tion faros, mi estos pli zorgema pri miaj observoj.



Mi refreŝiĝis kaj iris por ripozi. La Holandanoj estas tre maldelikata popolo. Mi rakontis la Etnan vojaĝon al la oficiroj, ĝuste kiel mi ĝin rakontis al vi, kaj kelkaj el ili, precipe la ŝipestro, ŝajnis per siaj grimacoj kaj duonfrazoj dubi pri mia veremo; tamen ĉar li afable prenis min sur sian ŝipon kaj estis ĝuste tiam servanta al miaj necesoj, mi enpoŝigis la insultojn.

Mi nun miaflanke komencis demandi, kien ili veturas. Al tio ili respondis, ke ili serĉas novajn malkovrojn, "kaj" — diris ili — "se via rakonto estas vera, nova vojo estas trovita, kaj ni ne revenos malkontentaj." Ni nun estis ĝuste en la unua vojo de kapitano Cook kaj en la sekvanta mateno alvenis en Botany Bay. Tiun lokon mi ne volas rekomendi al la brita registaro kiel loĝejon por krimuloj aŭ kiel punejon; ĝi devus esti rekompenco por merito. Naturo grandanime superŝutis ĝin per siaj plej bonaj donacoj.

Ni restis tie nur tri tagojn; la kvaran tagon post nia foriro leviĝis plej terura uragano, kiu detruis dum kelkaj horoj ĉiujn niajn velojn, disrompis nian buspriton kaj faligis nian topmaston; ĝi falis rekte sur la skatolon enhavanta nian kompason; la skatolo kaj la kompasilo dispeciĝis. Ĉiu marvojaĝinto scias la sekvojn de tia malfeliĉo: ni ne plu povis direkti nian ŝipon. Fine la ventego trankviliĝis kaj sekvis ĝin daŭra vigla vento, kiu forportis nin minimume sepdek mejlojn ĉiuhore dum ses monatoj! Poste ni komencis rimarki mirindan ŝanĝiĝon de ĉio ĉirkaŭ ni; niaj spiritoj faciliĝis, niaj nazoj estis regalataj per la plej agrablaj aromoj imageblaj; la maro ankaŭ ŝanĝis sian koloraspekton kaj el verdkolora fariĝis blanka!! Baldaŭ post tiuj mirindaj ŝanĝoj ni ekvidis teron kaj iom proksime golfon, en kiun ni veturis proksimume tricent kilo-



metrojn, kaj trovis ĝin vasta kaj profunda; en ĝi fluis plej bongusta lakto. Tie ni surbordigis kaj tuj trovis, ke tio estas insulo konsistanta el unu granda fromaĝo. Ni konstatis tion, kiam unu el niaj kunuloj svenis tuj post la surbordiĝo; tiu viro ĉiam sentis abomenon kontraŭ fromaĝo; kiam li rekonsciigis, li petis, ke ni forprenu la fromaĝon de sub liaj piedoj; post ek-



zameno ni trovis lin tute prava, ĉar la tuta insulo, kiel mi jam diris, estis nenio alia ol fromaĝo de trega grandeco! Per ĝi la loĝantaro, kiu estis mirinde grandnombra, precipe nutras sin, kaj ĝi rekreskas dumnokte proporcie al sia konsumiĝo dumtage. Ĉi tie estis sufiĉe da vinberarboj kun grandaj vinberoj, kiuj, post premado, donis nenion krom lakto. Ni vidis la loĝantojn kurantaj vetkonkursojn sur la supraĵo de la lakto: ili estis rektaj, elegantaj figuroj, nur futojn altaj, havis tri kru-rojn, sed nur unu brakon. Iliaj formoj estis entute graciaj, kaj dum kverelo ili uzas kun granda lerteco rektan kornon, kiu kreskas ĉe plenaĝuloj sur la centro de ilia frunto. Ili tute ne



surfundiĝis, sed kuris kaj marŝis sur la supraĵo de la lakto, kiel ni kuras kaj marŝas sur herbejo.

Sur ĉi tiu fromaĝa insulo abundege kreskas greno, kies rondformaj spikoj produktas tute pretajn panbulojn similajn al fungoj. Ni trovis dum nia vagado trans tiun fromaĝon dek sep aliajn riverojn da lakto kaj dek riverojn da vino.

Post tridek ok tagoj ni venis al la kontraŭa flanko. Tie ni trovis amason da blua ŝimo, kiel nomas ĝin la fromaĝ-manĝantoj; el ĝi kreskas ĉiuspecaj riĉaj fruktoj. Anstataŭ bredi akarojn, ĝi produktis persikojn, nektarinojn, abrikotojn kaj mil aliajn bongustajn fruktojn, kiujn ni tute ne konas. En tiuj arboj, kiuj havas mirindan grandecon, estis granda nombro da birdonestoj; inter aliaj estis grandega nesto de alciono; ĝi estis minimume duoble pli granda ol la kupolo de la preĝejo de Sankta Paŭlo en Londono. Esplorante ni trovis, ke ĉi tiu nesto estas farita el grandegaj arboj kurioze kunplektitaj; en ĝi estis (atendu unu momenton, mi volas paroli precize, kiel



ĉiam), en ĝi estis pli ol kvincent ovoj, kaj ĉio el ili estis tiel granda kiel kvar ordinaraj okshoftoj aŭ ok bareloj, kaj ni povis ne nur vidi la idojn interne, sed ankaŭ aŭdi ilin pepantaj. Tranĉe malfermite kun granda peno unu el tiuj ovoj, ni el-lasis ideton senpluman, multe pli grandan ol dudek plen-




kreskaj vulturoj. Ĝuste kiam mi donis al tiu junulo la liberecon, la maljuna alciono alvenis, kaj ekkaptante per unu el siaj ungegoj nian kapitanon, kiu sin okupis pri la rompado de la ovo, forflugis kun li pli ol mejlon alten; poste ĝi lasis lin fali en la maron, elbatinte ĉiujn liajn dentojn per siajflugiloj.

Holandanoj ordinare naĝas tre bone; li baldaŭ venis al ni, kaj ni reiris al nia ŝipo. Sed ni iris alian vojon ol antaŭe kaj rimarkis multajn strangajn objektojn. Ni pafmortigis du sovaĝajn bovojn, ĉiu havis unu kornon, kiel la loĝantoj, sed ĝi kreskis inter la okuloj de tiuj bestoj. Ni poste bedaŭris, ke ni mortigis ilin, ĉar la loĝantoj dresas tiajn kreitaĵojn kaj uzas ilin, kiel ni uzas ĉevalojn, por rajdado kaj por tirado de kaleŝoj; ilia viando, oni informis nin, estas bonega, sed senutila tie, kie la homoj sin nutras per fromaĝo kaj lakto.


Kiam ni estis en dutaga distanco de nia ŝipo, ni ekvidis du homojn pendantajn de sur alta arbo je siaj kalkanoj. Demandinte pri la kaŭzo de ilia puno, ni sciigis, ke ili estis vojaĝantoj, kiuj post hejmenreveno trompis siajn amikojn, prikskribante lokojn, kiujn ili neniam vidis, kaj rakontante pri aferoj, kiujn ili neniam spertis. Mi ne plu kompatis ilin, ĉar mi mem ĉiam limigas min al faktoj.

Tuj post nia alveno sur la ŝipo ni malligis ĝin kaj forveturis de tiu eksterordinara lando; tiam, je nia mirego ĉiuj multnombraj arboj sur la bordo, tre altaj kaj larĝaj, honoris nin dufoje per komuna kliniĝo; ili tuj reprenis sian antaŭan pozicion, kiu estis tute vertikala. Laŭ informo poste ricevita pri tiu fromaĝ-insulo, ĝi estas multe pli granda ol la tuta eŭropa kontinento!

Post vojaĝo de tri monatoj, ne sciante kien, estante ankoraŭ sen kompasoj, ni venis en maron, kiu ŝajnis preskaŭ nigra.




Gustumante la akvon, ni trovis, ke ĝi estas bonega vino, kaj kun granda malfacilo ni detenis la maristojn de ebriĝo. Post kelkaj horoj ni trovis nin ĉirkaŭataj de balenoj kaj aliaj grandegaj bestoj; unu el ili ŝajnis tiel granda, ke okulo ne povis formi juĝon pri ĝi; ni ne vidis ĝin antaŭ nia alproksimiĝo. Ĉi tiu monstro tiris nian ŝipon, kun ĉiuj ĝiaj starantaj mastoj kaj



veloj levitaj, per unu ensuĉo en sian buŝegon, inter siajn dentojn, kiuj estis multe pli grandaj kaj multe pli altaj ol la mastoj de unuaklasa batalŝipo. Kiam ni jam estis en ĝia buŝego kelkan tempon, ĝi malfermis ĝin sufiĉe vaste, enprenis grandegan kvanton da akvo kaj drivigis nian ŝipon, kiu havis minimume la ŝargamplekson de kvincent tunoj, en sian stomakon; tie ni kuŝis tiel kviete kiel ankrite en plena senventeco. La aero certe estis iom varma kaj tre malbonodora. Ni trovis ankrojn, kablojn, boatojn kaj barkojn en abundo, kaj multnombrajn ŝipojn, kelkajn ŝarĝitajn kaj kelkajn sen ŝargo, kiujn ĉi tiu kreitaĵo jam englutis.

La tuta laboro estis farata ĉe lumo de torĉoj; estis videblaj nek suno, nek luno, nek planedoj, laŭ kiuj oni povus fari observojn. Dufoje ĉiutage ni ĉiuj estis drivantaj kaj surfundiĝantaj; kiam ajn ĝi trinkis, fariĝis por ni tajdalfluo; kaj kiam ĝi ekskreis, ni trovis nin surfunde; laŭ modera kalkulo ĝi enprenis pli multe da akvo per unu sola engluto, ol oni ordinare trovas en la lago de Ĝenevo, kvankam tiu lago havas periferion de pli ol tridek mejloj. En la dua tago de mallibereco en tiuj regionoj de mallumo, ni dum malalta tajdo kuraĝis vagadi kun la ŝipestro kaj kelkaj oficiroj, kun torĉoj en niaj manoj. Ni renkontis homojn el ĉiuj nacioj, en la nombro de pli ol dek mil; ili volis interkonsiliĝi pri tio, kiel reliberiĝi. Kelkaj el ili jam loĝis en la stomako de tiu besto kelkajn jarojn; estis ĉi tie kelkaj infanoj, kiuj neniam vidis la mondon, iliaj patrinoj akŝis kelkajn fojojn en tiu varma situacio. Ĝuste kiam la prezidanto volis informi nin pri la motivo de la kunveno, tiu malbenita fiŝo, fariĝinte soifa, ektrinkis en sia kutima maniero; la akvo enverŝigis tiel rapide, ke ni ĉiuj tuj estis devigataj retiri nin al niaj respektivaj ŝipoj aŭ riski dronon; kelkaj devis naĝi

kaj kun malfacileco savis sian vivon. Post kelkaj horoj ni estis pli feliĉaj, ni interrenkontis denove, kiam la monstro ĵus malplenigis sin. Mi, estis elektita prezidanto, kaj mia unua ago estis proponi, ke ni kunligu du ĉefmastojn, kaj kiam la fiŝo malfermos sian buŝegon la proksiman fojon, starigu la mastojn tiel, ke ĝi ne povos fermi la buŝegon. Tiu propono estis unuanime aprobita. Cent fortaj viroj estis elektitaj por tiu tasko. Apenaŭ ni estis preparintaj niajn mastojn, sin prezentis oportuna okazo: la monstro malfermis sian buŝegon, oni tuj metis la supraĵon de la masto sub la palaton, kaj la alia fino traboris la langon; la operacio efike malebligis al la monstro fermi la buŝegon. Tuj kiam ĉio en ĝia stomako drivis denove, ni prenis kelkajn boatojn kaj remis nin for en la mondon. La taglumo post (kiom ni povis juĝi) trimonata enfermo en tuta mallumo, vigligis nian spiriton surprizege. Kiam ni



ĉiuj adiaŭis tiun ampleksan beston, nia societo konsistis el naŭdek ŝipoj ĉiunaciaj, kiuj kuŝis en ĉi tiu enfermita situacio.

Ni lasis la du mastojn en la buŝego de la monstro, por ke aliaj homoj ne estu malliberigitaj en la sama terura profundo de mallumo kaj malpuraĵo. Nia unua celo estis ekscii, en kiu parto de la mondo ni troviĝas; pri tio ni dum kelka tempo ne povis certiĝi. Fine mi trovis, sekve de antaŭaj observoj, ke ni estas en la Kaspia maro, kiu lavas parton de la lando de la kalmukaj tataroj. Kiel ni venis ĉi tien, estis neeble kompreni, ĉar ĉi tiu maro havas neniun komunikon kun alia maro. Unu el la indiĝenoj de la fromaĝa insulo, kiun mi kunvenigis, klarigis ĝin jene: ke la monstro, en kies stomako ni estis malliberigitaj, portis nin ĉi tien tra iu subtera koridoro. Ni remis al la bordo, kaj mi estis la unua, kiu surteriĝis. Ĝuste kiam mi metis mian piedon sur la teron, granda urso saltis sur min per siaj antaŭaj piedegoj. Mi ekkaptis po unu piedego per ĉiu mano kaj premegis ilin, ĝis kiam la urso blekis tre laŭte; en tiu



pozicio mi tenis ĝin, ĝis kiam ĝi mortis pro malsato. Eble vi ridos, sinjoroj, sed mi sukcesis en tio, ĉar mi malebligis al ĝi leki siajn piedegojn.

De tie mi veturis duan fojon al Peterburgo, kie malnova amiko donacis al mi bonegan ĉashundon; ĝi devenis de la fama hundino menciita antaŭe, kiu naskis dum la ĉasado. Malfeliĉe ĝi post nelonge estis pafmortigita de mallerta sportisto, kiu pafis al ĝi anstataŭ al aro da perdrikoj, kiujn la hundo ĵus flaris. El la felo de tiu kreitaĵo mi farigis ĉi tiun veŝton, kiu ĉiam kondukis min senvole al ĉasaĵo, kiam mi promenas en la kamparo dum la ĝusta sezono, kaj kiam mi venas sufiĉe proksimen, unu butono ĉiufoje defalas kaj lokiĝas sur la punkto, kie troviĝas la ĉasaĵo; kaj dum la leviĝo de la birdoj, estante ĉiam preta kaj kun ĉano streĉita, mi neniam maltrafas ilin. Jen restis nur tri butonoj; mi alkudros novan serion, kiam komenciĝos la sezono de ĉasado.

Kiam aro da perdrikoj estas maltrankviligitaj en tiu maniero per butono falanta inter ilin, ili ĉiam leviĝas de la tero en rekta linio unu post la alia. Iun tagon, forgesinte elpreni la premstangon el mia pafilo, mi elpafis ĝin rekte tra vico da perdrikoj, tiel regule, kvazaŭ la kuiristo estus trapikinta ilin. Mi forgesis enmeti la kugletojn, kaj la premstango fariĝis tiel varmega de la pudro, ke la birdoj komptete rostiĝis dum mia hejmeniro.

Post mia alveno en Anglujo mi plenumis tion, kion mi forte deziris, t. e. mi zorgis pri tiu indiĝeno de la fromaĝ-insulo, kiun mi kunvenigis. Mia malnova amiko, Sir William Chambers, estas mia ŝuldanto pro ĉiuj ideoj rilate al ĥina ĝardenarto, per kies priskribo li akiris tiel grandan reputacion. En konversacio, kiun mi havis kun tiu sinjoro, li ŝajnis esti tre



embarasita por trovi rimedon eklumigi la lanternojn de la novaj konstruaĵoj de Somerset House; la ordinara metodo de ŝtupetaroj, li rimarkigis, estas malpura kaj maloportuna. Mi tuj pensis pri mia indiĝeno de la fromaĝinsulo — kiam mi venigis lin de lia lando, li havis nur naŭ futojn, sed nun kreskis ĝis dek futoj kaj duono; mi prezentis lin al Sir William, kaj li estas nun elektita por tiu honorinda ofico. Li ankaŭ devas porti sub granda mantelo po unu ujo en ĉiu jaka poŝo, anstataŭ tiuj kvar, kiujn Sir William fiksas tute nature por privataj bezonoj en videbla situacio, en la granda kvarangulo.

De Sir William Pitt li ankaŭ akiris la oficon de kuriero al la Lordaj moŝtoj de la litoĉambro de lia reĝa moŝto. Lia ĉefa okupo nun estas, malkaŝi al sia honorinda patrono la sekretojn de la korteganaro.

SUPLEMENTO

*Eksterordinara flugo sur la dorso de aglo trans
Francujon ĝis Gibraltaro. Trans Sudan kaj Nordan
Amerikon, la polusajn regionojn, kaj returne al
Anglujo dum tridek ses horoj.*

Ĉirkaŭ la komenco de la regado de lia moŝto la nuna reĝo mi havis aferon kun malproksima parenco de mi, kiu tiam loĝis sur la insulo Thanet; temis pri familia disputo, kredible ne baldaŭ finiĝonta. Mi kutimiĝis dum mia loĝado tie, kiam la vetero estis bona, promeni ĉiumatene. Post kelkaj tiaj ekskursoj mi rimarkis objekton sur tre granda altaĵo en distanco de proksimume kvin kilometroj; mi plilongigis tien mian promenon kaj trovis ruinojn de antikva templo. Mi alproksimiĝis al ĝi kun admiro kaj mirego. La postsignoj de majesteco kaj belegeco, kiuj ankoraŭ restis, estis videblaj pruvoj de ĝia antaŭa grandiozeco; tie mi ne povis min deteni de lamento pri la detruo kaj ruiniĝo, kiun kaŭzas la tempo, pri kio tiu iam belega konstruaĵo donis tian melankolian ateston. Mi promenis ĉirkaŭ ĝi kelkajn fojojn, meditante pri la sendaŭreco kaj kadukiĝemo de ĉiuj surteraĵoj; ĉe la orienta fino estis restaĵoj de alta turo, preskaŭ dek du metrojn alta, superkreskita de hedero, kaj ĝia supraĵo ŝajnis esti plata; mi ekzamenis ĝin ĉiuflanke tre detale, pensante, ke se mi povos atingi la supron, mi ĝuos plej allogan vidaĵon de la ĉirkaŭa pejzaĝo.

Instigita de tiu espero, mi decidis atingi, se eble, la supron; tion mi fine efektivigis pere de la hedero, kvankam ne sen granda malfacileco kaj danĝero. Mi trovis la supraĵon kovrita per hedero, escepte de granda fendo en la mezo. Rigardinte kun agrabla miro la belaĵojn de arto kaj naturo, kiuj kune riĉigis la scenon, mi scivole deziris sondi la fendon en la mezo, por sciiĝi pri ĝia profundeco, suspektante, ke ĝi kredeble komuniĝas kun ne esplorita subtera kaverno en la monteto; sed ne havante ŝnuregon, mi ne sciis, kiel agi. Pripensinte la aferon dum iom da tempo, mi decidis enĵeti ŝtonon kaj aŭskulti la eĥon. Trovinte ŝtonon, kiu taŭgis por mia celo, mi lokis min super la aperturo, metante miajn piedojn sur ambaŭ flankojn, kaj kliniginte, por aŭskulti, mi enĵetis la ŝtonon. Tuj poste mi aŭdis bruetadon malsupre, kaj subite monstra aglo eligis sian kapon rekte kontraŭ mia vizaĝo, kaj leviĝante per ne rezistebla forto, ĝi forportis min sidantan sur ĝiaj ŝultroj.

Mi tuj ĉirkaŭprenis ĝian kolon, kiu estis sufiĉe granda por tute plenigi miajn brakojn, kaj ĝiaj flugiloj, kiam ili estis etenditaj, havis la longecon de naŭ metroj de unu ekstremo ĝis la alia. Dum ĝi leviĝis en reĝula ascendo, mia sidloko estis tute komforta, kaj mi ĝuis kun neesprimebla plezuro la malsupran vidaĵon. La aglo ŝvebis super Margate dum iom da tempo kaj estis vidata de kelkaj personoj; multaj pafoj estis celataj al ĝi; unu kuglo trafis la kalkanumon de mia ŝuo, sed tute ne difektis min. La aglo tiam direktiĝis al la Dover-krutaĵo kaj tie surteriĝis. Mi volis deagliĝi, sed tio estis malebligata per subita muskedara pafado de taĉmento da ŝipsoldatoj, kiuj sin ekzercis sur la marbordo; la kugloj flugis super mian kapon kaj kraketis sur la plumojn de la aglo kiel hajleroj, tamen mi ne

povis vidi, ke ĝi ricevis vundon. Ĝi tuj reascendis kaj flugis super la maro al Calais, sed tiel alte, ke la markolo ŝajnis esti ne pli larĝa ol la rivero Tamizo ĉe la Londona ponto. Post kvaronhoro mi trovis min super densa arbaro en Francujo, kie la aglo malleviĝis tre rapide. Tio igis min gliti ĝis la malantaŭa parto de ĝia kapo; sed ĝi flugis sur grandan arbon kaj levis sian kapon, kaj tiam mi revenis sur mian antaŭan sidlokon, sed mi ne vidis eblecon liberigi min sen danĝero de mortiĝo per falo; tial mi decidis sidi firme, pensante, ke ĝi portos min al la Alpoj aŭ al iu alia alta monto, kie mi povos deagliĝi sen danĝero. Post ripozo de kelkaj minutoj ĝi ekflugis, flugis kelkajn fojojn ĉirkaŭ la arbaro kaj kriis sufiĉe laŭte, por esti aŭdata trans la Kanalo. Post kelkaj minutoj samspeca aglo leviĝis el la arbaro kaj flugis rekte al ni; ĝi rigardis min kun evidentaj signoj de malplezuro kaj venis tre proksime al mi. Post kelkfoja ĉirkaŭflugo ambaŭ sin direktis sudokcidenten. Mi baldaŭ rimarkis, ke tiu, sur kiu mi rajdis, ne povis flugi tiel rapide, kiel la alia, sed iom kliniĝis al la tero pro mia pezo; ĝia kunulo, rimarkinte tion, turniĝis kaj lokiĝis en tia pozicio, ke la alia povis meti sian kapon sur ĝian dorson; tiamaniere ili iris ĝis la tagmezo, kiam mi vidis tre klare la rokon de Gibraltaro. Ĉar la aero estis klara, malgraŭ nia granda alteco, la supraĵo de la tero aspektis kiel landkarto, kie tero, maro, lagoj, riveroj, montoj ktp. estis perfekte distingeblaj; kaj havante iom da geografia scio, mi bone povis konstati, en kiu parto de la terglobo mi trovas min.

Dum mi konsideris ĉi tiun mirindan vidaĵon, terura bruego subite komenciĝis en la tuta ĉirkaŭaĵo, kaj post momento mi estis ĉirkaŭita de miloj da etaj nigraj, groteskaj, terurigaj kreitaĵoj, kiuj premegis min ĉiuflanke tiel, ke mi ne povis

movi manon nek piedon; sed ni ne estis en ilia posedo pli longe ol dek minutojn, kiam mi ekaŭdis la plej ĝojigan muzikon, kiun oni povas al si imagi. Ĝi subite ŝanĝigis en bruon plej teruran kaj laŭtegan, al kiu la bruego de kanono aŭ la plej laŭta krako de tondro ne havas plian similecon, ol la mildaj zefiroj de vespero al la plej terura uragano; sed la mallongeco de ĝia daŭro malebligis ĉiujn tiujn fatalajn efikoj, kiuj estas kaŭzataj ĉe longedaŭreco de tiu fenomeno.

La muziko komencigis, kaj mi vidis grandan nombron de la plej belaj etaj kreitaĵoj kapti la aliajn kaj ĵeti ilin kun granda forto en ion similan al flartabakujo, kiun ili tuj fermis, kaj unu el ili forĵetis ĝin kun nekredebla rapideco; tiam, turninte sin al mi, la kreitaĵo diris, ke tiuj, kiujn ili kaptis, estis bando da diabloj, kiuj forvadis de sia kutima loĝejo, kaj ke la ujo, en kiun ili estas metitaj, flugos kun egala rapideco dum dek mil jaroj, poste ĝi krevos per si mem, kaj la diabloj reakiros siajn liberecon kaj kapablojn, kiujn ili havis antaŭ la nuna momento. Kiam ĝi finis sian rakonton, la muziko tuj ĉesis, kaj ĉiuj malaperis, lasante min en spirita stato, kiu preskaŭ fariĝis malesperiga.

Kiam mi iomete retrankviliĝis kaj rigardis antaŭ min kun neesprimebla plezuro, mi rimarkis, ke la agloj pretiĝis por surteriĝi sur la pinto de Tenerifo. Ili malsuprenflugis sur la supron de roko, sed ne vidante eblecon de saviĝo, mi decidis resti, kie mi estis. La agloj sidiĝis, ŝajne lacigitaj; tiam la varmego de la suno baldaŭ igis ilin endormiĝi, kaj mi ne povis longe rezisti al ĝia ensorciga potenco. En la malvarmeto de la vespero, kiam la suno retiris sin sub la horizonton, mi estis vekita el la dormo per movo de la aglo sub mi, kaj etendinte min sur ĝia dorso, mi leviĝis kaj reprenis mian vojaĝan pozi-

cion; tiam ambaŭ ekfunkciigis siajn flugilojn, kaj reprenante sian antaŭan pozicion, ili direktis sin al Sudameriko. Ĉar la luno brilegis klare la tutan nokton, mi havis bonegan super-rigardon al ĉiuj insuloj en tiuj maroj.

Ĉirkaŭ tagiĝo ni atingis tiun parton de la granda amerika kontinento, kiu estas nomata Tero Firma; ni malleviĝis sur la supraĵon de tre alta monto. La luno, kiu estis malproksime en la okcidento kaj kovrita de malhelaj nuboj, jam ne donis pli ol sufiĉan lumon por ebligi al mi vidi specon de arbitaro ĉirkaŭe, portanta frukton, kiu similis brasikon kaj per kiu la agloj komencis sin nutri avide. Mi provis konstati nian situacion, sed nebuloj kaj pasantaj nuboj envolvis min en la plej densa mallumo, kaj la sceno fariĝis pli terura per la laŭtega blekado de sovaĝaj bestoj, el kiuj kelkaj ŝajnis esti tute proksimaj; tamen mi decidis resti sur mia sidloko, supozante, ke la aglo forportos min, se iu el ili provos malamikan atencon. Kiam taglumo komencis aperi, mi decidis ekzameni la frukton, de kiu manĝis la agloj, kaj ĉar kelkaj pendis tiel, ke mi povis facile atingi ilin, mi elprenis mian tranĉilon kaj detranĉis pecon; imagu mian grandan surprizon, kiam mi vidis, ke ĝi havas la aspekton de rostita bovaĵo, regule alternanta en grasa kaj muskola partoj! Mi gustumis ĝin kaj trovis ĝin bongusta, kaj kun granda plezuro mi poste detranĉis kelkajn grandajn pecojn kaj metis ilin en mian poŝon, kie mi trovis pankruston, portitan kun mi el Margate; mi elprenis ĝin kaj trovis tri muskedokuglojn, kiuj eniĝis en ĝin sur la Doverkrutaĵo. Mi elprenis ilin, kaj detranĉante kelkajn pliajn pecojn, mi manĝis bonege de la pano kaj malvarma viandofrukto. Poste mi detranĉis du el la plej grandaj fruktoj kreskantaj apud mi, kaj kunligante ilin per unu el miaj ŝtrumpligiloj, mi

pendigis ilin sur la kolon de la aglo por alia okazo, ankaŭ plenigante miajn poŝojn.

Dum mi aranĝis tiujn aferojn, mi ekvidis grandan specon de frukto, kiu havis la aspekton de plenblovita veziko, kun kiu mi volis provi eksperimenton; kiam mi pikis unu el ili per mia tranĉilo, elfluegis pura likvoro, simila al holanda juniperbrando, kiun la agloj avide trinkis de sur la tero. Mi tranĉis la vezikon tiel rapide kiel eble kaj savis en ĝia fundo proksimume duonlitron, kiun mi gustumis, kaj mi ne povis distingi inter ĝi kaj la plej bona monta vino. Mi eltrinkis ĝin kaj tre refreŝiĝis. En tiu tempo la agloj komencis ŝanceliĝi kontraŭ la arbetaro. Mi penis resti sur mia sidloko, sed baldaŭ mi estis ĵetata el kelka distanco en la arbetaron. Kiam mi provis leviĝi, mi metis mian manon sur grandan erinacon, kiu okaze kuŝis surdorse en la herbo; ĝi tuj fermiĝis ĉirkaŭ mia mano tiel, ke estis neeble forskui ĝin. Mi frapis ĝin kelkfoje sur la teron sen efiko; sed dum mi okupiĝis per tio, mi aŭdis brueton inter la arbetoj, kaj rigardante supren, mi vidis grandegan beston en distanco de tri metroj; mi ne povis defendi min, sed mi etendis ambaŭ manojn, kiam ĝi atakis min, kaj ĝi ekkaptis la manon, ĉirkaŭ kiu la erinaco estis fiksita. Mia mano baldaŭ liberiĝis, kaj mi forkuris kelkan distancon; tiam mi vidis la beston subite fali kaj morti kun la erinaco en sia gorgo. Kiam la danĝero forpasis, mi iris por vidi la aglojn kaj trovis ilin kuŝantaj sur la herbejo en profunda dormo, ebriigitaj de la likvoro, kiun ili trinkis. Efektive, mi mem estis iom influita de ĝi, kaj vidante, ke ĉio estas trankvila ĉirkaŭe, mi komencis serĉi plian kvanton, kiun mi baldaŭ trovis, kaj detranĉinte du grandajn vezikojn, ampleksantajn po kvin litroj, mi kunligis ilin kaj pendigis ilin sur la kolon de la dua aglo, kaj du pli

malgrandajn mi ligis per ŝnuro ĉirkaŭ mia talio. Kolektinte bonegan provizon da manĝaĵoj kaj rimarkante, ke la agloj jam komencas. revekiĝi, mi denove suragliĝis. Post duonhora ili leviĝis majeste de la loko, tute ne atentante sian ŝarĝon. Ĉiu el ili reprenis sian antaŭan pozicion, kaj direktante sin norde, ili transiris la Golfon de Meksikio, eniris Nordan Amerikon kaj flugis rekte al la polusaj regionoj, kio donis al mi la plej bonan okazon imageblan por rigardi tiun belegan kontinenton.

Antaŭ ol ni eniris la arktan regionon, la malvarmo komencis influi min; sed, trapikinte unu el miaj vezikoj, mi prenis gluton kaj trovis, ke la malvarmo poste ne povis fari al mi iun impreson. Pasante trans la Golfon de Hudson, mi vidis kelkajn ankritajn ŝipojn, apartenantajn al la samnoma kompanio, kaj multajn indiĝenajn gentojn, marŝantajn kun siaj peltoj al la vendejo.

Mi jam tiel al kutimiĝis al mia sidloko kaj fariĝis tiel sperta rajdisto, ke mi povis sidi rekte kaj rigardi ĉirkaŭ mi; sed ordinare mi kuŝis sur la kolo de la aglo, tenante ĝin firme per miaj brakoj kaj havante miajn manojn inter ĝiaj plumoj, por restigi ilin varmaj.

En tiu malvarma klimato mi rimarkis, ke la agloj flugis kun pli granda rapideco, supozeble por restigi sian sangon en cirkulado. Pasante la Baffin-golfon, mi vidis oriente kelkajn balenŝipojn kaj multajn surprizigajn glacio-montojn en tiuj maroj.

Dum mi superrigardis tiujn mirindaĵojn de la naturo, venis en mian kapon la ideo, ke tio estas bona okazo por trovi la nordokcidentan trairejon, se tia ekzistas, kaj akiri ne nur la premion proponitan de la registaro, sed ankaŭ la honoron de

eltrovo, kiu alportus tiom da avantaĝoj al ĉiu eŭropa nacio. Sed dum miaj pensoj estis okupitaj per tiu agrabla revo, mi estis alarmita per tio, ke la unua aglo frapis sian kapon kontraŭ solida travidebla substanco, kaj post momento tiun aglon, sur kiu mi rajdis, trafis la sama sorto, kaj ambaŭ falis ŝajne senvivaj. Ĉi tie niaj vivoj nepre finiĝus, se la sento de danĝero kaj la strangeco de la situacio ne estus inspirintaj min per grado de ĝustagado kaj lerteco, kiu ebligis al ni fali preskaŭ tri kilometrojn vertikale kun ne pli da maloportuneco, ol se ni malsupreniĝus per ŝnurego; ĉar tuj kiam mi ekvidis la kunpuŝigon de la agloj kun glaciigita nuboj, kiu estas kutima objekto apud la polusoj (la agloj estis proksime unu apud la alia), mi kuŝiĝis sur la dorso de la unua aglo kaj ektenis ĝiajn flugilojn por konservi ilian etendiĝon, samtempe etendante miajn piedojn malantaŭe, por subteni la flugilojn de la alia aglo. Tio havis la deziritan efikon, kaj ni malleviĝis tre bone sur monton glacian, kiu laŭ mia supozo altiĝis proksimume kvin kilometrojn super la marnivelo.

Mi deagliĝis, senŝarĝis la aglojn, malfermis unu el la veziĝoj kaj donis iom de la likvoro al ĉiu el ili sen konsideri, ke la teruroj de pereoj ŝajnis konspiri kontraŭ mi. La bruego de la ondoj, krakado de la glacio kaj la blekado de ursoj kune formis scenon plej teruran kaj timindan; sed malgraŭ tio mia zorgo pri la rekonsciigo de la agloj estis tiel granda, ke mi tute ne pensis pri la danĝero, kiu minacis min. Doninte al ili ĉian helpon, kiu estis en mia povo, mi staris super ili kun dolora maltrankvilo, bone sciante, ke nur per ilia helpo mi povas esti savata el tiuj malesperigaj lokoj.

Subite monstra urso, kun voĉo kiel tondro, komencis blekadi malantaŭ mi. Mi turniĝis, kaj vidante, ke la besto estas

preta por min formanĝi, mi pro timo tiel forte premis la vezikon, kiun mi havis en miaj manoj, ke ĝi krevis, kaj la likvoro, ŝprucante en la okulojn de la besto, tute blindigis ĝin. Ĝi tuj forturniĝis de mi, forkuris en konsterniĝo kaj tuj falis trans glacian krutaĵon en la maron, kaj mi ne plu vidis ĝin.

Post forpaso de tiu danĝero mi denove turnis mian atenton al la agloj, kiujn mi trovis en sufiĉe bona stato de resaniĝo, kaj supozante, ke ili senfortiĝis pro manko de nutraĵo, mi prenis viandofrukton, tranĉis ĝin en malgrandajn pecojn kaj prezentis ĝin al ili; ili ĝin formanĝis avide.


Doninte al ili sufiĉajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj eluzinte la reston de mia provianto, mi ekprenis mian sidlokon kiel antaŭe. Aranĝinte min kaj fiksante ĉion en plej bona maniero, mi komencis manĝi kaj trinki kun apetito; kaj pro la influo de la monto, kiel mi ĝin nomis, mi estis tre gaja kaj kantis kelkajn strofojn de kanto, kiun mi lernis, kiam mi estis knabo; sed la bruo baldaŭ alarmis la aglojn, kiuj estis dormantaj pro la kvanto de la likvoro, kiun ili eltrinkis, kaj ili leviĝis ŝajne tre teruritaj. Feliĉe por mi, tamen, dum mi nutris ilin, mi hazarde turnis iliajn kapojn al sudoriento, kaj en tiu direkto ili iris kun rapida movado. Post kelkaj horoj mi vidis la okcidentajn insulojn, kaj baldaŭ poste mi havis la neesprimeblan plezuron, ekvidi la malnovan Anglujon. Mi tute ne atentis la marojn kaj la insulojn, kiujn ni superpasis.

La agloj malleviĝis iom post iom, alproksimiĝante al la bordo kaj intencante surteriĝi, kiel mi supozis, sur unu el la Kimraj montoj; sed kiam ili estis en distanco de proksimume 55 metroj, oni pafis al ili per du kanonoj; unu kuglo trafis vezikon, kiu pendis ĉe mia talio, alia kuglo eniris en la bruston de

la antaŭa aglo, kiu falis sur la teron, dum la alia, sur kiu mi rajdis, ne ricevis vundon, sed forflugis kun mirinda rapideco.

Ĉi tiu cirkonstanco treege alarmis min, kaj mi komencis pensi, ke estas tute ne eble forsaviĝi, sed rekonsciiĝinte, mi denove rigardis malsupren, kaj je mia neesprimebla ĝojo mi vidis Margate en kelka distanco kaj la aglon malleviĝanta sur la malnovan turon, de kie ĝi forportis min en la mateno de la hieraŭa tago. Kiam ĝi surteriĝis, mi tuj deĵetis min, feliĉa, ke mi troviĝas denove redonita al la mondo. La aglo forflugis post kelkaj minutoj, kaj mi sidiĝis por trankviligi mian tremantan spiriton; tion mi faris dum kelkaj horoj.

Baldaŭ poste mi vizitis miajn amikojn kaj rakontis tiujn aventurojn. Mirego montriĝis sur ĉies vizaĝo; iliaj gratuloj ĉe mia feliĉa reveno estis ripetataj kun neafektita grado de plezuro, kaj ni pasigis la vesperon ĝuste tiel, kiel ni faras nun; ĉiu ĉeestanto faris plej altajn komplimentojn al mia kuraĝo kaj veremo.



www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-141-0